

# Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)  
95-a jaro • n-ro 1149 (7) • **Julio-aŭgusto 2002**

## Memreflektoj spegule al lingvojaroj



**Kalendaro  
2002**

**Daŭra kreskado  
de Esperantujo**

**Diverseco:  
ŝanco, ne minaco**

**Ni kaj la  
angla lingvo**

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio  
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot  
(1881-1910). Establita kiel organo  
de UEA en 1908 de Hector Hodler  
(1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto  
p/a Stano Marček, Zvolenská 15  
SK-036 01 Martin, Slovakio  
Telefona kaj telefaks:  
+421 43 4222 788  
Retpoŝto: revuo@uea.org

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-an de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 32;  
USD 30; JPY 3300 ktp); informiĝu  
ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.  
Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,00.

Anonctarifo (EUR): 1 p. 1000, 1/2  
p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16  
p. 90. Movada rabato 50%.  
Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas  
double. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus  
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro  
25.52.89.804). Nederlanda poŝta  
ĝirkonto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:  
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015  
BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefaks: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@co.uea.org

sekretario@co.uea.org, financujo@co.uea.org,

kongresoj@co.uea.org, libroservo@co.uea.org

uk.mendo@co.uea.org, direktoro@co.uea.org

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Trevor Steele



En Eŭropo komenciĝas somero kaj proponas al multaj el ni la plej fekundan sezonon por niaj aktivecoj. Esperantujo – la plej granda lando de la mondo – atendas nin “kun etenditaj brakoj”... Espereble la nuna numero pozitive agordos vin antaŭ ol vi prenos la valizojn (bv. ne forgesi la Jarlibron), kaj “vivos la ĉevalon”... – Jes ja, kiam mi estis novico inter esperantistoj, unu el la plej fascinaj avantaĝoj de Esperanto ŝajnis al mi la unika Delegita Reto kaj – la Jarlibro. Mi ne bone komprenas, kial oni tiel malofte trovas en gazetoj artikolojn pri ties praktika utilo por nia verda popolo. Mi volonte tion riparus: ĉu vi helpas min, kara leganto? Se vi havas unikajn travivaĵojn ĉi-koncerne, bv. rakonti ĝin al ni!

### Enhavo

- 147 .... MALFERME: Memreflektoj spegule de lingvoĵaro (Anna Margareta Ritamäki).  
148 .... Daŭra kreskado de Esperantujo (Lu Wunsch-Rolshoven).  
150 .... LINGVAJ FESTIVALOJ: Festivalo Planedo en Ukrainio (Konstantin Demjanenko).  
151 .... KONGRESA TEMO: Diverseco: ŝanco, ne minaco (H. Tonkin, J. Edwards).  
152 .... ESPERANTO EN RADIO: Ĉina Radio dissendas interrete.  
153 .... KALENDARO 2002  
155 .... LINGVA DISKRIMINACIO: Ni kaj la angla lingvo (Trevor Steele).  
156 .... UEA-membraro fine de 2001 (statistiko).  
157 .... TRA LA MONDO: Junuloj rete lingvumis en Ĉaĉak (Aaron Chapman).  
158 .... Fervojoj ĉi-jare en Bulgario. Kio estas Humanitas? (M. Spekuljak).  
159 .... RECENZO: Originalaj noveloj de 30 verkistoj (Donald Broadribb pri *Mondoj*).  
Bela ponto al kroata beleto (Jorma Ahomäki pri *Barkoj kaj Akvo*).  
156 .... Pledo por la gepatraj lingvoj vekas atenton (A. Ritamäki pri *Brilu ĉiu lingvo*).  
Ĵus aperis: *Vojaĝo en Esperanto-lando* de Boris Kolker. Nova Esperanto-voĉo premieris (A. Ritamäki pri opera prezento de Liisa Viinanen).  
161 .... LASTE APERIS.  
162 .... LOKE, FAKE, PERSONE.  
163 .... OFICIALA INFORMILO. ANONCETOJ.  
164 .... LANDAJ ASOCIOJ – LA KOLONOJ DE UEA (Michela Lipari, 3-a parto).  
166 .... FORPASOJ. KRUCENIGMA KONKURSO de Stano Marček.

FRONTPAĜE: Anna Margareta Ritamäki, kunordiganto de la retlisto por esperantistaj kunlaborantoj *Jaro-de-Lingvoj-2001*, komitatano A por E-Asocio de Finnlando, juna aktivulino (estrino de la 7-a Kultura Esperanto-Festivalo en Helsinko), aŭtorino de la apuda “malferma” artikolo, ĉe la lingvoĵara aŭto. Fotis Carola Antskog (la patrino).

### Estraro de Universala Esperanto-Asocio

**Prezidanto (strategia forumo, Unesko):** d-ro Renato Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎+39-06-957-57-13; f+39-06-957-66-33; revnato.corsetti@esperanto.org.

**Vicprezidanto (strategio kaj planado, UN Novjorko):** prof. Humphrey Tonkin, 279 Ridgewood Road, West Hartford, CT 06107 Usono; ☎+1-860-561-26-69 [h]; f+1-860-561-52-19 [h]; ☎+1-860-768-44-48 [h]; f+1-860-768-44-11 [of]; tonkin@mail.hartford.edu.

**Vicprezidanto (eksteraj rilatoj):** prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Resp.; ☎+82-53-765-0880 [h]; +82-53-652-4488 [of]; f+82-53-652-8141 [of]; +82-53-765-0881 [h]; lee@esperanto.net.

**Ĝenerala sekretario (faka agado, rilatoj kun TEJO, rilatoj kun la Komitato, kongresoj, Nobel-kampanjo):** s-ro Ivo Osibov, Vinkovačka 25, HR-21000 Split, Kroatio; ☎+385-(0)21-535-650 [h];

+385-(0)21-355-550 [of]; f+385-(0)21-393-597 [of]; osibov@pravst.hr.

**Financo, administrado:** s-ino Ans Bakker-ten Hagen, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎f+31-(0)20-642-18-53; ans.bakker@esperanto.org.

**Eduko, kulturo, ILEI-rilatoj, sporto, afrika agado:** s-ro Gbelego Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎+228-227-21-17; esp.togo@cafe.tg.

**Informado:** s-ro Andrej Grigorjevskij, ul. Lenina 40-14, RU-429120 Sumerija, Ĉuvaŝa Respubliko, Rusio; ☎+783536/59856; andreo@mail.ru.com.

**Landaj agado:** s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-06-39-72-61-98; f+39-06-39-72-61-69; michela.lipari@esperanto.org.

**Observanto de TEJO:** s-ro Marko Naoki Lins.

**Observanto de ILEI:** s-ro Mäuro La Torre.

# Memreflektoj spegule de lingvoĵaro

Pasis eŭropa lingvoĵaro, formala kampanjo subtenata de komisionoj, ministrejoj, organizaĵoj kaj, almenaŭ teorie, de minimume 45 eŭropaj ŝtatestroj – ja organizis la jaron la interŝtataj organizaĵoj, la tuteŭropa Konsilio de Eŭropa kaj la potenca Eŭropa Unio.

Kiel tio ĉi rilatas al ni? Kiel kunordiganton de la retlisto por esperantistaj kunlaborantoj *Jaro-de-Lingvoj-2001* la demando pri nia rolo kiel esperantistoj okupas min dekomence, unue instige al ekago, dume kaj nun poste, pritaksafaze, ĝi restas same esenca. Kion la lingvoĵaro signifas por Esperanto, por la esperantistoj kaj por la mondo ĉirkaŭ ni? Mi same povas demandi pri iu ajn socia tendenco. La lingvoĵaro estas nur unu ekzemplo de socia fenomeno, kiu povas influi la pensomondon de la esperantlingva komunumo kaj kiun ni povas reciproke influi per nia agado.

La eŭropa temjaro inspiris multajn inter ni. Okazis 16 lingvofestivaloj kunordigitaj de la TEJO-komisiitino Jekaterina Jevlampieva, inter ili 12 organizitaj de la partoprenantoj de la trejnseminario *La lingva ĉielarko*, okazigita de TEJO kadre de la Eŭropa Junulara Centro (KdE). Naciaj kaj internaciaj Esperanto-kongresoj traktis la jarajn temojn, pinte la Zagreba UK, kiu estis oficiala lingvoĵara evento. Dissendiĝis gazetaraj komunikaĵoj, eldoniĝis broŝuroj, lerniloj kaj temaj numeroj.

Esperantistoj aktivis en interretaj diskutejoj. Eble preskaŭ ĉio okazus ankaŭ pli-malpli same sen ia lingvoĵara kadro, sed ĝi estis plia instigilo, iaspeca ekstera rekono. Ni partoprenis en io pli vasta.

Inter ni okazis diskutoj pri la temo rekono, ekstera akceptigo, kaj pri niaj fortoj kaj malfortoj. La lingvoĵaro donis kuntekston. Ĝi ofertis socian spegulon, kiu helpas vidi nin mem pli bone. Ni havas kaj bezonas multajn tiajn spegulojn, ĉiun videbliganta iujn faktojn de nia ekzisto, malkaŝanta la limojn de niaj kapabloj, sed ankaŭ ion de tio mistera, kion oni povas nomi interna ideo aŭ motiviga forto.

Eventuale la lingvoĵaro ne estis historia turnopunkto. Eble ni ne parolos pri la jaro 2001 kiel la tempo kiam okazis la evolua transiro for de la anglalingva lingvoreĝimo direkte al la internacilingva. Tamen ĝi sendube havas valoron kiel simbolo pri sia tempo. Ial ĝuste nun Eŭropo, eĉ la mondo, estis preta tagordigi niajn temojn, almenaŭ la temojn de tiuj inter ni kiuj subskribis la Pragan manifeston de 1996. Kvin jarojn poste tiuj temoj estis jam seriozaj, politike eblaj, ne plu tabuoj. Subite la ridoj pri la strangaj esperantistoj estis malmultaj.

Esperanto estis menciita en sciencaj konferencoj kaj en la Eŭropa parlamento – de parlamentanoj kaj, ne malpli grave, parolata de junaj Euroscola-partoprenantoj. Ankaŭ en la plej alta politika nivelo io okazis. La EU-komisionano Vivianne Reading, repondec pri kulturo, menciis Esperanton en sia enkondukita parolado, ekrane montrita en la nacia malferma evento, kiun mi ĉeestis por Esperanto-Asocio de Finnlando. (Angle parolis la multlingva luksemburgiano kaj supezeble la ĉeestantoj ŝin komprenis. Subteksto ne aperis ekrane. Eble nur mi, esperantisto, cerbumis pri la lingvo-elekto.)

Ĉu komisionano Reading laŭdis la nuancoriĉon de nia lingvo kaj ĝian transnacion kulturon? Nu, ne. Ŝi menciis Esperanton kiel nedezirindan alternativon al multlingveco. Nur tion ni povas atendi ĝis ni sukcesos videbli ĝin pli nuance. Por tion fari ni bezonas memkonon, memrespekton kaj seke sanan memfidon. Ni devas ankoraŭ pli konatiĝi kun niaj facetoj diversspegule, serĉi komprenon pri la valoro de la lingvo, kies heredantoj ni estas. Nur ni esperantistoj estas la ĉi-momentaj portantoj de la lingvo Esperanto, de la kulturo, de la fenomeno. Ni portas ankaŭ la respondecon pri ĝi.

En la pritaksa enketo al KdE mi taksis ke UEA/TEJO-organizaĵoj okazigas sepdekon da lingvoĵaraj eventoj. Verŝajne – jes vere – la esperantistoj estis la plej aktivaj antaŭenigantoj de la temoj. Ĝoje kaj nature ni kunagadis. Ni multon lernis pri la mondo en kiu ni vivas kaj pri nia situo en ĝi. Ankaŭ aliaj ion lernis de ni.

Verŝajne ni ankaŭ estos inter la plej aktivaj festantoj de la patrinlingva tago deklarita de UNESKO, la 21-a de februaro ĉiujare, kaj de la Eŭropa lingvotago deklarita de KdE, la 26-a de septembro ĉiujare. (Interrete informoj ĉe <http://groups.yahoo.com/group/Lingvotagoj/> links.) Ja ni volas plu kunagadi pri niaj temoj, altigi ilian prestiĝon kaj mem pli bone kompreni la mondon de la lingvoj.

Tian etoson mi sentis lingvoĵare. Tian etoson mi spertas ankaŭ nun.

Anna Margareta Ritamäki





# La daŭra kreskado de Esperantujo

Kiam ĝis antaŭ unu jaro oni demandis min, kiel evoluas Esperanto, mi iomete hezitis. Kaj mi elturniĝis dirante, ke la evoluo estas malsama laŭ la landoj – ke en kelkaj landoj kreskas la kvanto de Esperanto-parolantoj, en aliaj ĝi stagnas, en iuj ĝi iomete malkreskas, ĉar ne alvenas novaj parolantoj pro manko de publika informado. Mi konsciis, ke la membronombroj de multaj landaj asocioj de UEA stagnas au eĉ malkreskas kaj ke en Germanio ili ondumas kaj ne multe ŝanĝiĝis sume en la tri pasintaj jardekoj. Sed subite mi konstatis, ke en multaj kampoj la aplikado de Esperanto fakte kreskadas de jardekoj.

## Ĉirkaŭ dekprocenta kresko

La Internacia Seminario (IS) de la Germana Esperanto-Junularo (GEJ) grandiĝis forte en la sepdekaj kaj okdekaj jaroj. En 1970 estis proksimume 50 partoprenantoj, en 1980 jam 150 kaj en 1990 estis pli ol 300. Triobligo en dek jaroj signifas 11-procentan kreskon. En 1980 en Germanio ekestis la Internacia Festivalo (IF) kaj la Printempa Semajno Internacia (PSI) kaj ankaŭ la Somera Esperanto-Familia Tendaro (SEFT) – ĉiuj tri por la postjunulara generacio. Ili intertempe kreskis al 200, 160, resp. 60 partoprenantoj. Aldoniĝos ĉi-jarfine kvina renkontiĝo, la Novjara Renkontiĝo, kiu havos kvindekda partoprenantoj. Entute oni do povas diri, ke la unusemajnaj internaciaj renkontiĝoj en Germanio kreskis de 50 partoprenantoj en 1970 al 700 homoj tridek jarojn poste – mezume proksimume 10-procenta jara kresko.

## Esperantujo: tutmonda progreso

Pri tiu kresko la Esperanto-komunumo apenaŭ konscias – mi ne vidis publikajn statistikojn pri la suma partoprenantaro de Esperanto-renkontiĝoj. Sed la kresko ekzistas, estas mezurebla kaj ŝajne estas tutmonda tendenco. Mi daŭre vidas, ke estiĝas novaj renkontiĝoj tutmonde, mi legas pri relative junaj renkontiĝoj (3-a, 5-a, 8-a ktp) en Afriko, en Hindujo, tre multloke – kaj ili daŭre kaj rapide kreskas.

Ni devas fronti krudajn faktojn: Esperanto (re)eniris la vojon de sukceso, kreskanta nombro da homoj volas lerni kaj poste uzi Esperanton en internaciaj renkontiĝoj – kaj ili tion fakte faras!

## De movado al kreskanta komunumo

Tiu turniĝo en la historio de Esperanto komenciĝis en la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento. (Fakte temas pri daŭriĝo de la centjara disvastiĝo, kiun interrompis mond militoj kaj diktatoroj.) La unua Internacia Seminario de GEJ okazis en decembro 1957 kun dudekkvino da partoprenantoj kaj ĝis 1970 ĝi kreskis al 50. (La temoj de IS-oj cetere kutimas esti ekster-Esperantaj – kaj ŝajne ankaŭ tio estis io nova.) En 1968 Hermann Behrmann fondis la Esperanto-Centron en Paderborn. Li okazigis amasajn korespondajn kursojn kaj tiel kreis multajn Esperanto-parolantojn. En la sepdekaj jaroj ĉiuj GEJ-estranaroj estis lernintaj per lia lernolibro *Esperanto programita*.



## Ĉefa utiligo: internaciaj renkontiĝoj

La tempo estis matura. Eŭropo, rekonstruite la vivon post la militaj detruoj, ekvojaĝadis – la Esperanto-parolantoj kunvojaĝadis kaj pliaj homoj komprenis la kernan praktikan utilon de Esperanto: personaj rilatoj internacie. Krom Internaciaj Seminarioj estiĝis pliaj junularaj renkontiĝoj, Internacia Junulara Festivalo en Italio, Internacia Junulara Semajno en Hungario, Kultura Esperanto-Festivalo en Nordio kaj multaj aliaj – malgrandaj kaj grandaj, du-tri-landaj kaj multnaciaj.

## Esperantuja muzika kulturo

Estiĝis Esperantuja muziko – ĉefe, ĉar en la kreskantaj kaj plioftiĝantaj renkontiĝoj kuniĝis kreskanta publiko. Antaŭ 1970 temis plej ofte pri tradukoj. Gianfranco Molle kaj aliaj tiam komencis kanti pri ni. La teknika kvalito de niaj kasedoj pro financaj kaŭzoj komence estis nekontentiga, sed ĝi dum tempo tre pliboniĝis. La postaj jardekoj vidis estiĝon de muzika Esperantuja kulturo kun alta kvalito – kaj la daŭra kresko estas impona. Intertempe ni povas ĝui la aktualajn produktojn de kvindekda muzikaj grupoj kaj kantistoj. En la interreto



ni trovas por senpaga elŭto ĉ. 175 muzikajn pecojn – entute pli ol ok horojn da nuntempca esperantlingva muziko. Oni povas cetere ŝati aŭ ne ŝati la memstarigon de la Esperantuja kulturo – ĝi simple estas fakto!

## Gazetoj diversiĝis

Dum la lastaj tridek jaroj oni povis konstati ankaŭ la aperon de multaj novaj gazetoj. Pri nia internacia komunumo raportas nun interalie *Eventoj* kaj la *Ondo de Esperanto*, pri la cetera mondo *Monato* kaj pri apartaj temoj kaj regione ekestis pliaj gazetoj. Ili vivas eksterrete kaj interrete, eble ne vere floras en kelkaj kazoj, sed ja kutime pluekzistas.

## Interreto – ĉu kreita por ni?

Venis la tempo de la interreto – kaj sekve plia internaciigo de la mondo. La Esperanto-parolantoj ĵetis kaj plu ĵetas sin al tiu eblo – nun oni povas ĉiutage, ĉiuminute vivi Esperantujojn. Kaj la kresko de Esperantujo pluiris en nova dimensio. Ni atingis daŭran kreskadon. Ni, Esperanto-parolantoj, povas iomete trankviliĝi: “La mondo” ja akceptas nian lingvon. Heziteme kaj iompost-iom, nerimarkite de la publika opinio kaj de la politikistoj – sed pri la tendenco ne estu dubo.



## Kaj post la junularaj jaroj?

La elirpunkto de tiu ĉi artikolo estis renkontiĝoj. Por multaj el ni certe venis iam la demando: *Kaj nun, kio post la junulara aĝo? Ĉu ni ĝuu Esperantujojn plu nur papere?* Nu, estiĝis IF, PSI kaj kelkaj similaj aranĝoj – kaj mi havas la impreson, ke la emo de plenkreskaj Esperanto-parolantoj teni la amikajn rilatojn el la junularaj jaroj momente ne havas sufiĉe da loko. Tial ni priprenis okazigi plian renkontiĝon, ne kiel konkurencon, sed kiel aldonon.

Ni ja imagu Esperantujojn post kvin jaroj. Plej supozeble plu alvenados la junuloj al siaj renkontiĝoj – kaj aĝigos ni ĉiuj. Aldone venadas homoj pli aĝaj. Esperantujo kreskadas. Ĉu ni ĉiuj kunpremiĝu en la jam ekzistantaj renkontiĝoj?

Post iom da historiaj kaj estontecaj rimarkoj mi do revenas al la origina temo de tiu ĉi artikolo: mi tutanime invitas vin festi kun ni la Novan Jaron en la nova Novjara Renkontiĝo. Sendepende de via aĝo: Estu bonvenaj! (\*Rimarko de la redaktoro: pliaj informoj en *Kalendaro sur la p. 154*).

**Lu Wunsch-Rolshoven**  
EsperantoLand

## Sur la fotoj:

- 1 – Turisma ekspurso dum la 18-a Printempa Semajno Internacia, okazinta ĉi-jare de la 29-a de marto ĝis la 5-a de aprilo en Waldfischbach, Germanio (foto: Franz Kruze).
- 2 – Koncerto de la grupo Esperanto-Desperado dum la lasta Internacia Junulara Kongreso en Strasburgo (foto: Laurent Vignaud).
- 3 – Lu Wunsch-Rolshoven, aŭtoro de la artikolo kaj organizanto de la nova Novjara Renkontiĝo en Germanio (vidu la *Kalendaron*).
- 4 – Bonvenigo de la nova jaro dum la 17-a Internacia Festivalo en Trier, Francio (foto: Liba Gabalda).
- 5 – Gejunuloj dum la 18-a Printempa Semajno Internacia en Waldfischbach, Germanio (foto: Franz Kruze).
- 6 – Komuna foto, Rusia E-Kongreso en decembro 2001.
- 7 – La plej junaj partoprenantoj de la 18-a PSI en Waldfischbach en Germanio serĉas paskajn ovojn (foto: Franz Kruze).
- 8 – Nuntempe ni povas ĝui la aktualajn produktojn de kvindekda muzikaj grupoj kaj kantistoj. Unu el la sukcesaj interpretistoj dum la 57-a IJK en Strasburgo estis Helena Melnikova el Rusio (foto: Laurent Vignaud).





## Festivalo Planedo en Ukrainio

Ĝi okazis en Berdjansko, kuraĉloko de suda Ukrainio, kiu troviĝas sur bordo de Azova maro, la 16-an kaj 17-an de marto 2002. Lingva festivalo estas aranĝo dediĉita al diversaj lingvoj kaj kulturoj. Dum la festivalaj tagoj en elektita lernejo, instituto aŭ kulturdomo, okazas diversaj lingvoprezentoj. Ili estas tre kurtaj (ĉ. 30 minutoj), sed plenaj de specialaj informoj pri nacia (aŭ artefarita) lingvo: pri gramatiko, pri popoloj kaj landoj kiuj uzas la lingvon, pri kulturoj ligitaj al la lingvo, pri ebloj lerni la lingvon ktp. Ĉiu lingvo dum la festivalo havas propran "hejmon", kiu estas, plej ofte, klasĉambro. Krom la prezentoj oni organizas diversajn konkursojn (ekz. por poliglotoj), kulturekspoziciojn, internaciajn koncertojn. Do, jen kurte kio estas "la tipa" LF.

Indas rakonti, kiamaniere ni venis al la ideo organizi lingvan festivalon en Berdjansko. Pri simila festivalo al ni rakontis geamikoj el Junulara E-Asocio de Ĉuvaŝio (Ĉeboksari). Tie LF faris unuajn paŝojn en eksa Sovetunio. Ni aŭskultis niajn Ĉeboksarajn samideanojn kaj ĝojis, kiel bonan vojon ili elektis por evoluigi la E-aganon. Ĉu io povas pli bone montri la movadon, ol ĝia emo fari bonajn aferojn ne nur por si mem, sed ankaŭ por la ekstera mondo?

LF elvokis sinceran intereson pri Esperanto de la junularo, kiu, eĉ se ĝi pli frue aŭdis pri Esperanto, ĝis nun ne rilatis al la lingvo kaj movado serioze. Ankaŭ ni, pensante pri eblaj formoj de kluba agado en nia urbo, decidis, ke LF estas inda afero por provi ĝin realigi.

Kun tiuj pensoj ni faris en novembro 2000 viziton al unu berdjanska lernejo (N° 15) kun la propono organizi kune propran lingvan festivalon. Kiom agrable estis, kiam oni volonte subtenis nin! Ni tamen komprenis ke niaj ebloj trovi instruistojn de diversaj naciaj lingvoj ne estas tre vastaj, kaj, por plimultiĝi la festivalajn fortojn ni decidis proponi kunlaboron al ĉiu urba organizo aŭ nacia societo, kiu dezirus kun ni aranĝi la festivalon.

Esperantistoj venis al urbaj institutoj, naciaj societoj, kulturdomoj kaj diris: *ki organizas lingvan festivalon. Ĉu vi volas, ke ĝi estu ankaŭ via festivalo?* Kaj preskaŭ ĉie, kie tio estis proponita, oni respondis jese.

Post tri monatoj de prepara laboro la organiza komitato de la LF jam konsistis, krom reprezentantoj de nia Berdjanska E-klubo Verda Mevo (Ukraina Esperanta Asocio), el ofiĉistoj kaj lingvofakuloj el lernejo N° 15, kulturdomo Neftĥimik, Berdjanska Ŝtata Pedagogia Instituto, Berdjanska Entreprena Instituto, urbestraj klerig-kaj kulturkomitatoj. Oficialaj subtenantoj de la LF, krom TEJO, iĝis Azova Regiona Universitato kaj Azova Fiŝmastruma Instituto. La festivalo trovis inform-sponsorojn, inter kiuj estis tutukrainia gazeto *Zagranica*, Berdjanska Urba Televida Kompanio, radiostacioj kaj gazetaro.

La unua LF en Berdjansko brile sukcesis. Malgraŭ tio, ke esperantistoj ne estis solaj inter la organizantoj, la festivalo havis du laborajn lingvojn: la rusan kaj Esperanton. Kiel fondinto de la festivalo la negranda kaj senmona E-klubo ekhavis grandan

influan al LF-aranĝoj, kaj esperantistoj fariĝis geamikoj por lingvoinstruistoj aŭ lingvoŝatantoj en la urbo. Nur tiu urbano, kiu ne eliris el sia hejmo, ne aŭskultis radion, ne spektis televidon kaj ne legis gazetojn, ne aŭdis pri Esperanto. Multaj eksciis kaj sincere ekinteresiĝis pri Ukraina E-Asocio kaj TEJO. Diversajn aranĝojn de la unua LF en Berdjansko (17-18 de marto 2001) vizitis pli ol 2000 homoj.

Pasis unu jaro, kaj LF, kiu en Berdjansko ricevis propran nomon *Planedo*, revenis. Ĉi-foje ĝi okazis en maltrankvila tempo - du semajnoj antaŭ parlamentaj kaj urbestraraj elektoj, kio, ŝajnis, povus turni la atenton de la civitanaro for de tiu klerig-kultura aranĝo. Malgraŭ ĉio LF denove okazis. Al niaj informaj sponsoroj aldoniĝis la TEJO-revuo *Kontakto*, kio permesis diri, ke pere de Esperanto pri LF en Berdjansko oni legos en dekoj da landoj de la mondo. Ĉi-foje en la festivalo estis prezentitaj 17 naciaj (angla klasika, angla usona, greka, bulgara, nederlanda, hebrea, latina, germana, pola, rusa, slovaka, turka, ukraina, franca, japana, itala, hispana), 2 artefaritajn (Esperanto kaj Interlingva) kaj 4 popol-profesiaj kaj specialaj lingvoj (rusia *ferja*, mara flaga signalo, morsa kodo, gestolingvo). Ses Esperantajn prezentojn vizitis ĉirkaŭ 70 homoj,

inter kiuj plimulto estis lernantoj kaj studentoj. Ĉiu partopreninto pleniĝis demand-folion, laŭ kiu oni nomis la plej popularajn lingvoprezentojn. La unuan lokon okupis la turka lingvo, la duan la hispana, la trian la franca. Entute nur la *lingvan parton* (se ne kalkuli tiujn, kiuj spektis la internacian koncerntan programon) en 2002 vizitis pli ol 1000 homoj. Unu el niaj konkludoj: la festivalon populariĝus E-aj muzikistoj kaj kantistoj el eksterlando. Se prezenton de Esperanto farus kune svedo, italo, ruso kaj ukrainiano, nenio pli bone povus demonstri la internacian karakteron de la lingvo internacia. Tial ni konsilas al LF-organizantoj inviti eksterlandajn gastojn. La festivalo estas inda okupo por ĉiu klubo, grupo, asocio, kiu ŝatus ne nur plimultiĝi sian membraron, sed fari ion bonan por la socio kaj internacia amikeco. Provu tion fari kaj vi trovos multajn novajn amikojn.

Konstantin Demjanenko



Prezento de la itala (supre) kaj angla (sube) lingvoj.



## Diverseco: ŝanco, ne minaco

Ĉu Esperanto prezentas realan solvon al la dilemo *diverseco aŭ globalismo*? La reĝisoroj de la ĉi-jara Kongresa Temo invitas ankaŭ vin al la diskuto.

La tutmonda polemiko pri tutmondismo (aŭ *globalismo*) reliefigas la streĉitecon inter du malsamaj konceptoj de nia mondo. Laŭ ies opinio, la avancoj de teknologio, precipe en la komunikado, nehaltigeble integrigas la mondon: la malfirmiĝo de merkatoj, la kreiĝo de ĉiam pli granda edukita klaso de homoj, kies perspektivo etendiĝas preter la naciaj limoj, la iompostioma apero de internaciigita kulturo kaj internaciigita lingvo, ĉio ĉi estas neevitebla, aŭ eĉ dezirinda. La kreo de tiu internacia medio trovas ĝin liberiga kaj poviga, argumentante, interalie, ke la ekonomia malfirmiĝo rezultigas ankaŭ politikan malfirmiĝon.

Aliaj opinias, ke tiu tutmonda, globala socio alportas grandajn negativajn elementojn. Ili argumentas, ke la avantaĝoj de kelkaj estas aĉetataj je la kosto de multaj, kiuj restas malriĉaj kaj ekspluatataj - kaj apenaŭ pli liberaj. Ili krome asertas, ke la homoj havas rajton ĝui la propran kulturon, paroli la propran lingvon kaj vivi la propran vivon laŭ valoroj ne nepre similaj al tiuj de ĉiuj aliaj. Se oni perdas sian identecon, oni perdas ankaŭ sian senton de radikeco, sian membrecon en kolektivo - kaj la homa specio estas specio, kiu ŝatus, eĉ devas, formi siajn komunumojn, kun kiuj identiĝi.

Tamen, argumentante por diverseco, oni riskas forgesi pri la gajnoj, kiuj rezultis tra la jaroj el universalismo. La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj de 1948 ja ne registris la realon en la diversaj ŝtatoj de la mondo, sed almenaŭ ĝi registris la aspirojn de la subskribintoj, ke ekzistas bazaj valoroj, kiuj estu komunaj al ĉiuj socioj. Tiaj principoj plifaciligis la emancipiĝon de rasaj kaj etnaj minoritatoj en multaj ŝtatoj; ili donis novan povon al la aspiroj de virinoj; ili plifortigis respekton al la principo, ke ĉiuj homoj havas rajton ĝui la riĉecon de la propra socio aŭ almenaŭ esti ŝirmataj kontraŭ ekonomia mizero. La principo de universaleco ja kuŝis malantaŭ la ideoj kaj aspiroj de Zamenhof, kiu serĉis inter la homoj komunajn principojn rasajn, religiajn, kaj ĉefe lingvajn. Tiuj, kiuj argumentas por diverseco, argumentas por ĝi surbaze de certaj tamen universalaj principoj. Kaj tiuj, kiuj argumentas por globalismo, deklaras, ke ĝi donas al ili liberecon por vivi la vivon laŭ la propra elekto. Nek diverseco nek universaleco estas absoluta: la fundamenta demando estas trovi la ĝustan ekvilibron inter la du.

Diverseco alportas grandajn defiojn. La nova komunika kaj transporta teknologio tiel faciligis la migradon, ke preskaŭ

neniu lando en la mondo plu asertus, ke ĝi konsistas el nur unu etno - kaj novaj moroj politikaj kaj sociaj montras al ni pli klare la ekziston de malplimulto en la diversaj landoj, kun siaj diversaj rajtoj kaj pretendoj. Sed la reliefigo de tiuj diversecoj neeviteble vekas kontraŭstarojn kaj timojn: ju pli ni emfazas niajn diferencojn, des pli forta estas la kontraŭreago.

Iuj homoj argumentas, ke la solvo, se entute ekzistas solvo, estas interkompreniĝo, kaj kanalo de niaj diferencoj en normojn kaj morojn, kiuj celas limigi konfliktojn: ni devas, laŭ ili, krei universalajn morojn kaj instituciojn, kiuj garantias kaj konservas la diversecon. La historiistoj atentigas, ke tra la jaroj la grandajn antaŭensaltojn de la civilizo kaŭzis ĝuste la interago de la kulturoj: la interŝanĝo de diversaj ideoj progresigas la homaron. Tamen, tiuj gajnoj je dinamiko ankaŭ portas kun si kostojn: socioj, en kiuj ekzistas granda diverseco,

estas malpli facile regeblaj kaj pli konfliktoplenaj.

Hodiaŭ, multaj fakuloj argumentas, ke diverseco de kulturoj kaj lingvoj tra la mondo estas valoraj kaj konservinda. La biologoj klare montris (kaj ŝajne neniu serioza sciencisto tioen kontestus), ke genetica diverseco kaj diverseco de specioj en nia ekosistemo estas neta pluso. Multaj socilingvistoj simile argumentas pri la lingvoj, asertante, ke lingva diverseco estas pozitiva faktoro, kaj ke, se ni ĉiuj parolus nur saman lingvon, ni estus malpli kapablaj adaptiĝi al ŝanĝiĝantaj kondiĉoj. Ili atentigas, ke almenaŭ

kvindek procentoj de la lingvoj de la mondo estas sub minaco kaj verŝajne malaperos en la nuna jarcento. Dum iuj tiel argumentas, aliaj asertas, ke lingvoj kaj specioj estas tamen tute malsamaj kaj nekompareblaj fenomenoj. Se ni akceptas, ke la lingva diverseco estas en si mem almenaŭ faktoro, kiu buntigas la mondon, kaj kiu helpas ŝirmi la homojn kontraŭ la fremdiĝo kaj senradikeco de la moderna vivo, ni tamen, kiel esperantistoj, devas agnoski, ke lingva diverseco estas en alia senco ankaŭ pesto, kies spektro hantas jam de jarcentoj la terglobon, bremsante la interkompreniĝon kaj la kreon de komunaj valoroj. Ĉu eble Esperanto, kiu kvazaŭ transportas lingvajn diferencojn sen malagnoski ilian ekziston, kaj kiu rolas kiel unuigilo en lingva diverseco, tamen prezentas realan solvon al tiu ĉi dilemo, kaj meldon ankaŭ por la solvo de aliaj similaj dilemoj?

Humphrey Tonkin kaj Jane Edwards  
Reĝisoroj de la Kongresa Temo




Foto el la UK en Stuaĉburgo: Laurent Wignand





## Ĉina Radio elsendas ankaŭ interrete

Ĉina Radio Internacia (antaŭe Radio Pekino) komencis la Esperanto-disaŭdigon la 19-an de decembro 1964. Nun la disaŭdigo okazas ĉiutage kvarfoje po duonhora, kaj estas dissendata al kvar regionoj: Eŭropo, Latin-Ameriko, Japanio kaj Koreio, kaj Sudorienta Azio. Ekde la unua de majo 2002 la elsendoj estas legeblaj kaj aŭdeblaj ankaŭ interrete.

La programo konsistas el *Novajoj* (ĉiutage), *Raporto pri kurantaj aferoj* (de lundo ĝis vendredo), *Leterkesto* (lunde), *Vojaĝo en Ĉinio* (marde), *Ĉina kulturo* (merkredo), *Ĉina ekonomio* (ĵaŭde), *Socia vivo* (vendredo), *Esperanto en marŝo* (sabate) kaj *Literatura programo* (dimanĉe).

La aŭskultantoj troviĝas en pli ol 50 landoj kaj regionoj de la mondo. Ĉiujare la Esperanto-sekcio ricevas ĉirkaŭ 2000 poŝtaĵojn kun aŭskultraportoj, proponoj kaj sugestoj koncerne la programon. La teknika fako de Ĉina Radio Internacia faras ĉion eblan por plibonigi la aŭdeblecon kaj la Esperanto-sekcio serioze traktas proponojn kaj rimarkojn kaj reguligas la konsiston de la programo por ke ĝi estu pli kaj pli ŝatata kaj aŭskultinda, kaj enhave kaj lingvaje.

En la pasintaĵo 40 jaroj nia Esperanto-sekcio ĉiam tenis bonan kunlaboron kun UEA kaj aliaj E-organizoj internaciaj kaj landaj, kiuj donas fortan subtenon al ĝia laboro. La Centra Oficejo de UEA akceptis niajn laborantojn kiel volontulojn; UEA nuligis la kotizon de niaj raportistoj al la Universala Kongreso, en kiuj la prezidanto kaj la ĝenerala sekretario ĉiam volonte akceptas intervjuojn de niaj raportistoj, ili estas varme bonvenigitaj de niaj aŭskultantoj, precipe de tiuj, kiuj ne povas ĉeesti la kongresojn.

La Esperanto-sekcio havas intimajn rilatojn kun diverslandaj aŭskultantoj kaj firmigis kun ili profundan amikecon. Aŭskultado de E-disaŭdigo de nia radio fariĝis neforigebla parto de ilia ĉiutaga vivo. Ĉi-koncerne ekzistas multaj kortuŝaj rakontoj, Dum dekoj da jaroj oni persiste aŭskultas, skribas kaj aktive partoprenas en konkursoj kaj aliaj

aktivaĵoj. Hans Erasmus el Nederlando kaj Maurice Sujet el Francio gajnis specialajn premiojn kaj senpage vojaĝis al Ĉinio por unu semajno. Ni povas sincere diri, ke ĉiuj niaj progresoj kaj sukcesoj estas nedisigeblaj disde la subteno kaj kunlaboro flanke de E-organizoj kaj niaj aŭskultantoj.

La unuan de majo ĉi-jare surretigis la Esperanto-disaŭdigo kaj la multjara deziro de ni ĉiuj finfine fariĝis fakto. La surretigo vekis fortan eĥon kaj vastan atenton de Esperantujo kaj diverslandaj aŭskultantoj. En 2-3 tagoj venis al nia sekcio dekoj da gratulaj kaj retaj mesaĝoj kun ĝojo kaj kontento pri la programo kaj la retpaĝo.

La prezidanto de UEA d-ro Renato Corsetti gratulante promesis ke li kaj



Renato Corsetti kaj Lee Chong-Young vizitis en novembro la redakcion.

UEA faros ĉion eblan por diskonigi nian disaŭdigon. Eksprezidanto de la komisiono pri Azia Esperanto-Movado, nia fervora japana aŭskultanto Takeuti Yosikazu, opinias la surretigon nova kaj brila mejloŝtono por la interpopola komunikado per Esperanto en la mondo. La gratulaj leteroj kun kuraĝigaj vortoj fortigas nian konfidon.

La surretigo ne estas facila afero kaj bezonas seriozecon, zorgemon, persistemon kaj multflankan laboron. Sed interreto, vere moderna tekniko, alportas oportunojn kaj rapidecon. Tial



ĉiuj membroj de la Esperanto-sekcio jetis sin en preparlaborojn, venkinte la problemojn. Nun jam multaj interesiĝantoj rete aŭskultas nian programon kaj opinias, ke nia retejo estas je bela kaj profesie projektita nivelo, eble la plej aktuala inter la Esperanto-radiostacioj.

La surretigo estas sukceso por la tuta Esperantujo, ĉar oni povas montri al nesperantistoj kiel nia lingvo aspektas.

Havigi ĝojon kaj kontenton al aŭskultantoj estas sankta deo de niaj Radio-laborantoj kaj ilia sindona laboro venigas kompenson: ili fariĝas propagandantoj de niaj retpaĝoj. La Esperanto-disaŭdigo progresas dank' al la

kunlaboro de Esperanto-organizoj kaj subteno de niaj aŭskultantoj. Tio estas movforto por nia laboro.

La Esperanto-disaŭdigo aŭdeblas kaj legeblas en ĉiu angulo de la mondo per la retejo: <http://esperanto.cri.com.cn>.

Bonvolu daŭre oferi viajn kontribuojn por la retpaĝoj. Kontaktiĝu kun ni: Esperanto-sekcio, cri-36, Ĉina Radio Internacia, Poŝtkasto 4216, Pekino, Ĉinio 100040, aŭ retroŝte: [espradio@cri.com.cn](mailto:espradio@cri.com.cn).

Esperanto-sekcio de Ĉina Radio Internacia



Pri la informoj en la kalendaro respondecas nur la organizantoj mem. La venonta kalendaro aperos en la novembra numero.

## Julio

- 14-18: Balta Esperanto-Forumo** en Kaliningrad, renkontiĝo kun socia, kultura kaj turisma programo. [RU-236039](mailto:RU-236039) Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando, [sezonoj@yahoo.com](mailto:sezonoj@yahoo.com), [www.sezonoj.tgo.com](http://www.sezonoj.tgo.com)
- 26 jul - 02 aŭg: 18-a Internacia Simpozio pri E-Turismo**, kun studadesio de AIS pri ekologio en Amazonio, ŝipvojaĝo Manaus-Belem, Brazilo. Monda Turismo, Esperantotur, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-82-094 Bydgoszcz, Pollando. [sezonoj@yahoo.com](mailto:sezonoj@yahoo.com), [www.sezonoj.tgo.com](mailto:www.sezonoj.tgo.com)
- 14-27: 50-a Esperanto-tendaro** (dua etapo), Lančov, Ĉeĥio. [KCE](mailto:KCE) Esperanto, CZ-674 01 Trebič, Ĉeĥio. [+420618841909](tel:+420618841909), registriro [+420618851196](tel:+420618851196) [podtradska@volny.cz](mailto:podtradska@volny.cz)
- 19-23: Preparado al Altaj Studoj**, Bouresse, Francio. Gvidas Janine Dumoulin, Georges Lagrange. [Kvintopalo](mailto:Kvintopalo), Esperanto-Centro, FR-86410 BOURRESSE, [+33 \(0\) 5.49.42.80.74](tel:+3330549428074), [kvintopalo@club-internet.fr](mailto:kvintopalo@club-internet.fr), <http://hometown.aol.com/yanickdulm/kvintopalo.html>
- 19-28: 25-a SEPT, Somera E-Familia/Feria Tendaro** en Thomsdorf. [Werner Pfennig](mailto:Werner Pfennig), Uns Hüsing 29/1104, DE-17034 Neubrandenburg, Germanio. [+49\(0\)395-4221398](tel:+4903954221398). [werner.pfennig@veg.de](mailto:werner.pfennig@veg.de)
- 20: Memorfersto pri 50 jaroj de Grésillon**, prezento de la jubilea membra (meze de E-kursoj kaj prelegoj: 6-13 jul, 13-20 jul, 20-27 jul, 27 jul-3 aŭg, 3-10 aŭg, 10-17 aŭg). [Chateau](mailto:Chateau), FR-49150 Baugé; [+33\(2\)41-89-10-34](tel:+33241891034); [kastelo.gresillon@free.fr](mailto:kastelo.gresillon@free.fr), <http://igreziljono.kastelo.free.fr>

## Aŭgusto

- 01-03: Komuna Seminario de Japana, Korea kaj Ĉina E-Junularoj** en Tiba (apud la flughaveno Narita, Japanio). [Japania Esperanto-Junularo](mailto:Japania Esperanto-Junularo) ĉe JEI, Sinzjuku-ku, Waseda-machi 12-3, JP-162-0042 Tokio, Japanio. [jej@egroups.co.jp](mailto:jej@egroups.co.jp)
- 01-04: Hispana Kongreso de Esperanto** en Alicante. [Augusto Casquero](mailto:Augusto Casquero), Avenida Burjasot 29, A-31, ES-46009 Valencia. [+34-96-3849616](tel:+34963401369). Rete: [augustocasquero@infogocio.com](mailto:augustocasquero@infogocio.com), <http://www.esperanto-es.net/kongreso2002>
- 03-10: 87-a Universala Kongreso de Esperanto** en Fortaleza, Brazilo. [CO de UEA](mailto:CO de UEA), adreso kaj kontaktoj en la kolofono. Temo: *Diversco: ŝanco, ne minaco*.
- 03-10: 52-a Kongreso de Kristana E-Ligo Internacia (KELI)**, Berektürdö, Hungario [Iren Bagi](mailto:Iren Bagi), Baross u. 54/b, HU-1201 Budapest.
- 06-10: Preparado al la skriba parto de la ekzameno pri kapableco**, Bouresse, Francio (gvidas Georges Lagrange). [Kvintopalo](mailto:Kvintopalo) (v. 19 jul).
- 06-11: 5-a PIK, Plurnivela Internacia Kursuro**, La Chaux-de-Fonds, Svislando. [KCE](mailto:KCE) (v. 23 jul).
- 09-11: 50-a Somera Esperanto-Tendaro**, renkontiĝo de samaj tendaranoj en Lančov. [KCE](mailto:KCE) Lančov (v. 14 jul).
- 10-20: Somera E-lernejo** kun trinivelaj kursoj, Rečić, Bosnio-Hercegovino. [Esperanto-ligo de Serba Respubliko](mailto:Esperanto-ligo de Serba Respubliko), pk. 335, BA-78000 Banja Luka, Bosnio kaj Hercegovino. [elsr@bbic.net](mailto:elsr@bbic.net).
- 12-21: 24-a Renkontiĝo de E-Familioj** en Sikonda, Hungario. [Familio Slezak](mailto:Familio Slezak), H-9200 Mosonmagyaróvár, Damjanich u. 2, Hungario.



- [+36 \(96\) 211 271](tel:+3696211271). [+36 \(96\) 579 430](tel:+3696579430). [pannonbe@elender.hu](mailto:pannonbe@elender.hu), <http://re2002.freeweb.hu>
- 13-17: Praktikado de la lingvo (2-a nivelo)** laŭ la natura metodo Freinet en Bouresse, Francio. [Kvintopalo](mailto:Kvintopalo) (v. 19 jul).
- 13-18: 5-a PIK - Plurnivela Internacia Kursuro** (dua semajno) en La Chaux-de-Fonds, Svislando. [KCE](mailto:KCE) (v. 23 jul).
- 15-25: Rusiaj Esperanto-Tagoj** apud Kovrov (regiono Vladimir). [RET-02](mailto:RET-02), Pk. 57, RU-105318 Moskvo, Rusio. Andrej Grigorjevskij. [+7-83556-59856](tel:+78355659856). [andreo@mail.ru](mailto:andreo@mail.ru) kaj Garik Kokolija [+7-\(0\)95-567700](tel:+70095567700), [garik@mitino.ptt.ru](mailto:garik@mitino.ptt.ru)
- 17-23: 6-aj Bretonaj Renkontiĝoj**, Plouézec, Bretonio, Francio. [Roger Eon](mailto:Roger Eon), 5 kervilin Izelan, FR-22470 Plouézec; [+33\(2\)96-22-77-17](tel:+33296227717); [esperanto.22@libertysurf.fr](mailto:esperanto.22@libertysurf.fr)
- 18-26: 3-a Eŭrop-Medicina E-Kongreso**, Hódmezővásárhely, Hungario. [Katalin Faragó](mailto:Katalin Faragó), pk. 89, HU-6801 Hódmezővásárhely; [konyo@korhaz.hodtav.hu](mailto:konyo@korhaz.hodtav.hu), [esp-med@freemail.hu](mailto:esp-med@freemail.hu)
- 19-24: Internacia Natarkuraca Konferenco**, Krefeld, Germanio. [Anatolo Gončarov](mailto:Anatolo Gončarov), pk 65, RU-197022 Sankt-Peterburg, Rusio. [anatolo@mail.ru](mailto:anatolo@mail.ru)
- 19-25: Kafolaĉa Internacia Somera Renkontiĝo (KISO)** Marburg. [Marburga Esperanto-Grupo](mailto:Marburga Esperanto-Grupo) (MEG), Aföllersr. 19, DE-35039 Marburg/Lahn, Germanio. [kiso@esperanto.de](mailto:kiso@esperanto.de)
- 23-26: 3-a Azia Kongreso de E-o**, kun sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj, Seulo, Koreio. Temo: *Kompeniĝado inter kulturoj*. Postkongresa ekskurso. [Korea Esperanto-Asocio](mailto:Korea Esperanto-Asocio), 1601 Kangbyon Hanŝin Core B/D, 350 Mapo-dong, Mapo-gu, Seoul - 121-7073; [82 2 717 6975](tel:+8227176975); [82 2 717 6975](tel:+8227176975); [keast@soback.kornet21.net](mailto:keast@soback.kornet21.net) aŭ [aziakongreso@hanmir.com](mailto:aziakongreso@hanmir.com); <http://esperanto.or.kr/>
- 23-28: 5-a Eŭrop-Unia E-Kongreso**, Verono, Italio. [Verona E-Grupo](mailto:Verona E-Grupo), C. P.1616, IT-37100 Verona; [esperantoverona@adriaco.it](mailto:esperantoverona@adriaco.it); Temo: *Efektiva lingva egaleco: rajto de la eŭropanoj*.
- 24: 6-a Internacia "Esperanto" Tablotenis-konkurso**. [Katalin Faragó](mailto:Katalin Faragó), pk. 89, HU-6801 Hódmezővásárhely, Hungario. [konyo@korhaz.hodtav.hu](mailto:konyo@korhaz.hodtav.hu) kaj [esp-med@freemail.hu](mailto:esp-med@freemail.hu)
- 24-31: 28-a Internacia Semajno ĉe Mediteraneo** kun 3-nivelaj kursoj. [Esperanto Culture et Progrés](mailto:Esperanto Culture et Progrés), 5, rue du docteur Roux, FR-34090 Montpellier, Francio; [046751543](tel:+3346751543) [quienne@netcourrier.com](mailto:quienne@netcourrier.com), <http://perso.wanadoo.fr/nikolaos/esperanto.html>
- 26 aŭg - 1 sept: Humanista E-Semajno** en Chervar-Porat, Norda Adriatika. La temo: Bertrand Russel. [Mato Spekuljak](mailto:Mato Spekuljak), Ostarijska 8, HR-10000 Zagreb, Kroatio <http://www.geocities.com/adhumanitate/humdomo.htm>
- 30 aŭg - 7 sept: FESTO**, Internacia junulara renkontiĝo de JEFO, en la kastelo Greziljono, Valo de Luaro, Francio. [Grésillon](mailto:Grésillon) (v. 20 jul), <http://festo2002.free.fr>, [cpoullet@oreka.com](mailto:cpoullet@oreka.com)

30 aŭg - 08 sept: 25-a Sanmarina Universitata Sesio de AIS, Nitra, Slovakio. ☒ AProf. Dr. Eva Poláková, Ustav didaktikoj technologie, Ped. Fakultato UKF, Tr. A. Hlinku 1, SK-949 01 Nitra, Slovakio. ☒ [epolakova@ukf.sk](mailto:epolakova@ukf.sk), <http://www.ais-sanmarino.org/>

## septembro

01-08: Humanisma E-Semajno en Chervar-Porat, Norda Adriatiko. La temo: L. Zamenhof. ☒ Mato Spekuljak, Ostarijska 8, HR-10000 Zagreb, Kroatio. ☒ [mato.spekuljak@zg.tel.hr](mailto:mato.spekuljak@zg.tel.hr) <http://www.goeocities.com/adhumanitate/humdomo.htm>

02: Komenco de 4-monata plentempa E-kurso ĉe la Popolalternejo de Karlskoga, Svedio. Informoj ĉe la kursgvidanto Lars Forsman, ☒ [lars.forsman@fsh.karlskoga.se](mailto:lars.forsman@fsh.karlskoga.se)

02-05: Tutmonda Konferenco pri Kibernetiko, Nitra. ☒ AProf. Dr. habil. Eva Poláková, PF UKF, Tr. A. Hlinku 1, SK-949 74 Nitra, Slovakio. ☒ +421-37-6511013. ☒ [epolakova@ukf.sk](mailto:epolakova@ukf.sk)

07-08: Skota Studrondo, Dumbane, Skotlando, Britio. ☒ Esperanto-Asocio de Skotlando, 47 Airless Crescent, Motherwell, ML1 3AP, Britio. ☒ +44-1698-263199. ☒ [david@bisset100.freeserve.co.uk](mailto:david@bisset100.freeserve.co.uk)

07-14: Astronomio: amatoroj kontribuas. Staĝo en Sankt-Mikaela Observatorio, suda Francio. ☒ Alex Mikisev, AEK, str. Uziel 120/S, IL-52302, Ramat-Gan, Israelo. ☒ [astroek@yahoo.com](mailto:astroek@yahoo.com)

08-10: 18-a Mikologia Seminario en Poprad, Slovakio, kun omaĝo al Milan Zvara. ☒ Stano Marek, Zvolenská 15, 036 01 Martin, Slovakio. ☒ +421 43 4222788. ☒ [marek@esperanto.sk](mailto:marek@esperanto.sk)

10-15: IBIRE - La 2-a Internacia Bicklista Renkontiĝo. Dobřichovice apud Prago, Ĉeĥio. ☒ KAVA-PECH, Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice. ☒ +420/324/615-651. ☒ +420 2 5771 2126. [info@kava-pech.cz](mailto:info@kava-pech.cz), <http://www.kava-pech.cz>



13-17: 16-a Kongreso de Itala Katolika Unuiĝo de Esperantistoj en Marina di Pietrasanta (Luca). ☒ Gianni Conti, via Filizi 51, IT-20032 Cormanò (MI), Italio. ☒ +39-02-66301958. ☒ [cont.giovanni@tsccati.it](mailto:cont.giovanni@tsccati.it)

14-21: 4-a Kongreso de Asocio de E-istoj-Handikapuloj, IKEH, Janské Lázně (montaro Krkonošské) (Odv.) kun lingvokurso. ☒ Peter Hauser, PF 401243, DE-63277 Dreieich, Germanio. ☒ +49 56 24 80 07. ☒ [HDP@internacia-festivalo.de](mailto:HDP@internacia-festivalo.de)

20-23: Internacia Amikeca Renkontiĝo, Aylesford, Kent. ☒ IAR-02, 7 Hampton, Great Holm, Milton Keynes, MK8 9EP, Britio. ☒ +44-(0)1908-564004. ☒ [terry-page@supanet.net](mailto:terry-page@supanet.net)

21-22: Aŭtunaj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando en Taivalkoski. Temo: Pensu globe - agu lokel! ☒ Aini Vääraniemi, Väärjärventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando; ☒ [aini.vaaraniemi@pp.inet.fi](mailto:aini.vaaraniemi@pp.inet.fi)

21-29: 28-a Internacia Forumo pri turismo, edukado kaj kulturo, Bydgoszcz, Pollando. ☒ Monda Turismo (v. 26 jul)

22 sept - 01 okt: Festivalo de Babilono, Bagdado. ☒ Himyar M. Al-Resheed Al-Zubaidy, Saidia 821/90/21, POBox 5820, Bagdad, Irako. ☒ +964-1-5537514. ☒ [himyar@uruklink.net](mailto:himyar@uruklink.net)

26-29: 13-a Montkabana Renkontiĝo (aranĝo por montmigremuloj kaj naturamikoj), Logarska Dolina, Slovenio. ☒ Vanja Radovanović, Horvacańska 31, HR-10000 Zagreb, Kroatio, ☒ +385-1-913654626. ☒ [vanja.radovanovic@etkicriesson.se](mailto:vanja.radovanovic@etkicriesson.se)

27-29: Turisma aŭtuno en Roháče, Slovakio. ☒ Esperanto-MEL, P.O.Box B-152, 01201 \*ilina, Slovakio, +421 903 552152, [gondzur@urap.sk](mailto:gondzur@urap.sk)

28-30: 22-a Nordokcidenta Regiona E-Konferenco en Sidney (Brita Kolumbio, Kanado). ☒ Norek, 765 Braemar Avenue, Sidney, BC, V8L 5G5, Kanado. ☒ +1-250-6561767, ☒ +1-250-656-0502. ☒ [lwolenskati@aol.com](mailto:lwolenskati@aol.com)

## oktobro

04-06: 15-a Internacia Kultura Festivalo en Ústí nad Labem, Ĉeĥio, rememore al J. Korinek kaj T. Pumpur. ☒ Miroslav Smyčka, Kojetická 90, CZ-40003 Ústí nad Labem, Ĉeĥio. ☒ +420 47 5532417.

04-06: 88-a Japana E-kongreso, Hukusima, temo: *Flora kulturo porpaca*. ☒ Japana Esperanto-Instituto, Sinyuku-kun Waseda-mati 13-3, Tokyo-to 162-0042, Japanio. ☒ +81-(0)3-32034581, ☒ +81-(0)3-32034582. ☒ [jei@mre.biglobe.ne.jp](mailto:jei@mre.biglobe.ne.jp)

04-06: Faulhaber-semajnfino, Elspeet, Nederlando, temo: *Komunikado*. ☒ Sally Krombeen-van Aartsen, Vijverstr. 3, NL-4421 AW Kapelle, Nederlando.

11-13: Jarkunveno de GEFA (Germana Esperanta Fervojista Asocio) en Baidersbronn. ☒ Siegfried Krüger, Dinkelsbühler Str. 12, 74074 Heilbronn. ☒ +49 7131 162688. ☒ [sikrueger@gmx.de](mailto:sikrueger@gmx.de)

19-26: 10-a Internacia E-Semajno de Kulturo kaj Turismo en Cambrils, Tarragona (Katalunio, Hispanio). ☒ Santiago Torné, Apartat 423, 08200-Sabadell, Hispanio. ☒ 937253421, 937275021, ☒ 937314111. ☒ [luis\\_serrano@e-milio.com](mailto:luis_serrano@e-milio.com)

25-27: 37-a Semajnfina Esperanto-Seminaro en Neubrandenburg. ☒ Werner Pfennig, Uns Hüsung 29/1104, DE-17034-Neubrandenburg, Germanio. ☒ +49(0)395-4221398. ☒ [werner.pfennig@web.de](mailto:werner.pfennig@web.de) aŭ [werner.lieven@t-online.de](mailto:werner.lieven@t-online.de)

26-27: Jarkunveno de la Heslanda E-Ligo en Michelsthal (Odv.) kun lingvokurso. ☒ Peter Hauser, PF 401243, DE-63277 Dreieich, Germanio.

27 okt - 2 nov: 3 stagoj pri Esperanto (komencantoj), ekoturismo kaj kurso, en feriejo La Freychède apud Montpellier, Francio. ☒ Claude Fressonnet, 43 Place du Rumat, FR-09500 Mirepoix. ☒ (33) (0)5 61 60 18 95. ☒ [claudette.fressonnet@wanadoo.fr](mailto:claudette.fressonnet@wanadoo.fr)

27 okt - 3 nov: E@-seminario "Rete Informadi" pri informstrategioj, en Esperanto-domo, Lesjöfors, Svedio. ☒ [eche@tejo.org](mailto:eche@tejo.org)

28-31: Praktikado de la lingvo (1-a, 2-a niveloj) en Bouresse. ☒ Kvinpetalo (v. 19 jul).

## novembro

01-03: 31-a Kataluna kaj Transpirenea Kongreso de Esperanto, Sóller, Majoroko, Hispanio. ☒ [margabe@telemo.es](mailto:margabe@telemo.es)

06-08: Terminologia Seminario pri trafiko, sub aŭspicio de IPEF, Dobřichovice, Ĉeĥio. ☒ KAVA-PECH (v. 10 sep).

08-10: KAESt 2002 - Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, sub aŭspicio de UEA, Prago, Ĉeĥio. Temoj: Elektronikaj rimedoj, Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj, Aplikoj de Eo en scienco kaj tekniko. ☒ KAVA-PECH (v. 10 sep).

08-10: 2-a Internacia Kongreso de la 3 Kalifornioj: Kongreso kun scienco, kultura kaj amuzo programo, AIS-RISM-Meksiko. ☒ 52 - 686-5565886-Mexicali-Meksiko. ☒ "rubenfeldman" <[rufe@com6md.cablemas.com](mailto:rufe@com6md.cablemas.com)

15-17 (ŝanĝo!): 10-a Kongreso de ĈEA ligita al solenaĵo omaĝe al la 100-jariĝo de la E-klubo en Prago, Ĉeĥio. ☒ KAVA-PECH (v. 10 sep).

23: 4-a EFIFO - Esperanta Filmfestivalo en Bratislava, Slovakio. ☒ Nataša Šándorová, Zahrebská 4, 81105 Bratislava, Slovakio. ☒ +421 2 52494587, ☒ [natasa.sandorova@nextra.sk](mailto:natasa.sandorova@nextra.sk)

## decembro

06-08: Kultura Semajnfino en Homburg, Germanio. ☒ Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL). ☒ [Ercmontara.EC@t-online.de](mailto:Ercmontara.EC@t-online.de)

07: 22-a ĈESAT - Ĉeĥa-Saksa Tago en Ústí nad Labem, Ĉeĥio. ☒ Miroslav Smyčka (v. 04 okt).

10-15: Unu jarcento de Esperanto tra la verkoj de Valo, Bouresse, Francio (gvidas Thérèse Pinet kaj Georges Lagrange). ☒ Kvinpetalo (v. 19 jul).

27 dec-03 jan: Novjara Renkontiĝo apud Berlino. ☒ EsperantoLand, Louis Ferd. v. Wunsch-Rolschoven, Wicelstr. 9, 10551 Berlin, Germanio. ☒ +49-30-685 58 31. ☒ +49-30-68 05 70 11. ☒ [Lu@EsperantoLand.org](mailto:Lu@EsperantoLand.org), <http://www.EsperantoLand.org/eoir.html>

27 dec-03 jan: 19-a Internacia Festivalo, Borken-Gemen, Germanio, temo: *Dio kaj la mondo - religio kaj politiko*. ☒ Hans-Dieter Platz, postfach 1148, D-34303 Nidenstein. ☒ +49 56 24 80 07. ☒ [HDP@internacia-festivalo.de](mailto:HDP@internacia-festivalo.de)

27. dec - 03. jan: 46-a Internacia Seminario en Trier. ☒ Martin Sawitzki, Max-Plack-Ring 84/L 56, DE-98693 Ilmenau, Germanio. ☒ +49-3677-844505. ☒ [admin@esperanto.de](mailto:admin@esperanto.de), [www.internacia-seminario.de](http://www.internacia-seminario.de)

La redakcio deziras al vi agrablan restadon en la plej granda lando de la mondo sen lingvaj problemoj - Esperantujo!

# Lingva diskriminacio



Trevor Steele

## Ni kaj la angla lingvo

Kiam Zamenhof lanĉis sian projekton, eŭropaj ŝtatoj konkurencis por regi la mondon politike. La plej prestiĝa lingvo estis ankoraŭ la franca, sed seriozaj rivaloj estis la angla kaj germana. Esperantisto povis esperi, ke nia lingvo prezentas alternativon al tiu nesolvebla konflikto de la gigantoj.

Hodiaŭ la situacio estas tute alia. Estas nur unu politika superpotenco, kaj la lingvo rivalaleco ŝajnas esti "solvita". Ĉu ankoraŭ estas eĉ unu stato de la mondo - ekster la dekoj da oficiale angliglingvaj - kie la angla ne estas la plej grava fremdlingvo? Kaj la lingva motoro de la ŝajne nehaltigebla ekonomia/politika tutmondigo estas tiu sama lingvo, kiun oni aŭdas en ĉiuj grandaj flughavenoj, ĉe preskaŭ ĉiuj internaciaj renkontiĝoj.

Ofte ni legas kaj aŭdas, ke la angla estas jam la monda lingvo, fakte se ne jure. Ĉu lingva imperiismo? Nu jes, estas homoj kaj organizoj, kiuj konscie kaj intence profitas ekonomie kaj kulture de la daŭra disvastiĝo de sia ĉienvicna lingvo. Sed inter la plej fervoraj ĉampionoj de tiu venko estas nedensajloj, homoj sincere kredantaj, ke la mondo bezonas internacian lingvon kaj ke estas noble labori por tiu celo, aparte se la lingvo ne estas ilia propra. En Nederlando la lokaj homoj aŭtomate kaj - tiel ŝajnas - volonte parolas angle al vizitantoj. Ĉu imperiismo?



(ilia ĉeesto en E-kurso estis preteksta: ilia vera celo estis eniri okcidentan Eŭropon). Post kelkaj lecionoj la plej akutmensa diris al mi, *Jes, nun ni scias, ke ni povus rapide lerni Esperanton. Sed tiu lingvo ne interesas nin, ni volas uzadi la anglan*. Mi sentis tenton respondi, ke post dudek jaroj ili ankoraŭ nebone uzos la anglan, sed tio ne estus persvadinta ilin elerni Esperanton.

## Batalo por egaleco

La argumento, ke Esperanto kiel komuna pontlingvo garantius egalecon al ĉiuj, estas forta. (Ni provizore pretervidu la evidentaĵojn, ke Esperanto estas almenaŭ komence multe pli facila por eŭroplingvuloj ol por aliaj.) Kaj ĝenerala adopto de Esperanto sparus multe da mono nun bezonata por tradukado/interpretado. Ni scias, ke Esperanto multe pli taŭgas ol la angla, sed se en ĉiuj lernejoj de la mondo oni lernas la anglan ekde la unuaj jaroj, ĉu tio ne donus laspecajn justecojn kaj egalecon?

Kvankam lingvo estas ege grava parto de nia vivo, ŝajnas, ke nuntempe la homaro plejparte ne tre ekscitiĝas pri lingva malegaleco. Kaj eĉ se estas ligo inter lingva malegalecoj en ekonomio kaj kulturo, nu, ankaŭ tio ne estas prioritata por multaj homoj.

## Ĉu entute penvaloras?

Iam esperantistoj kredis vidi signojn de espero el diversaj anguloj. La plej fruaj adeptoj de la lingvo esperis je la apogo de elitaj grupoj de internacipensaj intelektuloj, akademiuloj kaj tiel plu. En la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj ŝajnis esti forta ligo inter la iama venko de socialismo kaj tiu de Esperanto (en Brazilo, spiritismo kaj Esperanto simile ligiĝas). Post la Dua Mondmilito Ivo Lapenna atingis almenaŭ simbolan apogon ĉe grandaj internaciaj organizoj.

El la aktuala evoluo estas malfacile ĉerpi esperon. La fino de la falsa "Malvarma Milito" ege plifortigis la anglan kaj almenaŭ provizore tre malfortigis Esperanton. Eble la nombro de esperantistoj kresketas, sed ni en la CO konstatas, ke la membraro de UEA faladas. Kiel do reagi? Rezigni pri iluzioj, trovi pli kontentigan hobion? Kampanji kontraŭ la angla? Gluti venenon?

## Realismo

Mi opinias, ke ni devas realisme akcepti, ke ni travivas epokon malfavoran al la ideo de neŭtrala mondolingvo. Se

Akademio de Esperanto jam havas lokon en la tuta teksto. La adreso estas

<http://www.akademio-de-esperanto.org>

La paĝojn pretiĝis Bertilo Wennergren, al kiu la estraro esprimas sian plej koran dankon. (Ideojn pri plibonigo eblas sendi al: Bertilo <[bertilo@gmx.net](mailto:bertilo@gmx.net)>)

Interreto: aktuala listo de konataj E-aranĝoj konsulteblas ĉe: [www.esperanto.hu/kalendar.htm](http://www.esperanto.hu/kalendar.htm) Kompleta txt-versio riceveblas ĉe aŭtomato: [kalendaro@esperanto.org](mailto:kalendaro@esperanto.org)



ni ne akceptas tion, ni riskas daŭre rami la kapon kontraŭ nemoveblaj muroj. Kaj ni serĉos la kialojn de "malvenko" en maĝusta loko: eble ni kulpigos la ĉepelitajn literojn, la burokraton de la CO, la amatorecon de la estraro, la eksdatajn ritojn kaj simbolojn de nia agado, la imperiismon de *British Council* aŭ – plej kontentige – la stultecon de la homaro. Eĉ eblus, ke kulpigante kaj batalante inter ni, ni atingus la finan malvenkon.

Cu ni do retiriĝu en nian tendareton, kultivu nian gardeneton, kaj ĝui la nestvarmon de intima grupeto?

Donkionte provi batali kontraŭ la aktuala historia evoluo, aŭ preskaŭ rezigni pri ekstera ekspansio, ŝajnas al mi montri nesufiĉan komprenon pri la dimensioj de nia kampanjo. Ni provas solvi problemon probable samaĝan kiel la homaro: kaj ni senpacienca, ke jam pasis pli ol jarcento kaj la fina venko mankas!

La lingvo Esperanto estas preta, estas bela ilo evoluigebla, sed ĉu la mondo estas preta por ricevi ĝin? La homaro devos esti pli matura, antaŭ ol ĝi vere komprenos la demandojn, kiujn ni levas per nia agado. Ni proponas veran kaj tre profundan revolucion: ke ni kiel specio konscie elektu kontraŭ la ĝisnunan iron de la historio kaj emfazu nian solidaron trans ĉiuj baroj, ke ni estu en la plej kerna senco demokratio, kaj ke ni ne akceptu la region de la plej potenca.

Cu mi ĵus diris, ke la homoj estas ankoraŭ tro stultaj por akcepti vere tuthomaran lingvon? Ne, la ĝusta vorto ne estas

stulta, sed nekonscia. Vi kaj mi apartenas al avangarda elito – lingve. Certe ni estas nekonsciaj pri aliaj problemoj, sed lingve ni havas la honoron kaj ŝarĝon pioniri, kio postulas de ni prudenton, kuraĝon kaj eltenemon.

## Konsolo?

Cu mia vidpunkto estas provo trovi konsolon en senespera situacio? Ĉu la angla ne estos jam delonge la fakta monda lingvo, antaŭ ol la homaro estos konscia? Nu, povas esti. Vi kaj mi ne povos tion obstakli, sed la mondo decidis tiel.

Jen do la situacio: la elekto estos inter la angla, la plej forta lingvo, kaj Esperanto, la plej bona por la rolo. Se la homaro sufiĉe rapide maturiĝos, la decido estos por Esperanto. Kion ni do faru? Via vivo kaj mia estas mallongaj, ni povas atingi nur malmulton, sed tion ni devas atingi. Ni laboru por tiu nobla afero, eĉ se ni ne vidus tujan rezulton. Tion ni faru diligente, kreoplene kaj ĝue. Nia kontribuvo estas necesa, sed decida nur en tio, ke ni devas vivteni la lingvon kaj la ideojn, ĝis la homaro mem decidos.

Lasta penso ĉi-riate: la mondo ege rapide ŝanĝiĝas. Bildigu la diferencojn inter nia planedo en 1900 kaj en 2000. Sendube ĝi ŝanĝiĝos pli en la venontaj kvindek jaroj ol en la pasintaj cent. En 2002 Esperanto estas uzata de ege malgranda procentaĵo de la homaro; eble en 2052 ĝia populareco vaste superos tiun de la angla nun.

# Tra la mondo



## Junuloj rete lingvumis en Ĉaĉak

**Balkanio: regiono kun malfacila historio, sed plena je espero por la estonteco. Se ni povas juĝi laŭ la sukcesoj de la tria seminario Esperanto@Interreto, ankaŭ la Esperanto-movado tie sekvas pozitivan kaj renovigan vojon. Estis mia granda plezuro partopreni la seminaron kiel membro de la organiza teamo, kaj mi ŝatus dividi miajn spertojn kun vi.**

La unua E@I ekster Svedio okazis inter la 28-a de aprilo kaj la 5-a de majo en Ĉaĉak, Serbio. Apud la montoj kaj banate de la varma printempa suno, tridek junuloj el dek tri landoj renkontiĝis por partopreni en abunda kaj interesa programo.



Samtempe kun tia spertiĝo venis tuj la ŝanco por ekutiligi la novajn scipovojn. Laborgrupoj esploris la eblojn por novaj projektoj kaj evoluigis ekzistantajn.

La ĉefa temo estis *Rete Lingvumi*, sed ne estis forgesita la fundamenta eco de kunlaboro kiun traktis la antaŭaj E@I-seminarioj. Fakte, sesioj pri kunlaboriloj estis same gravaj en la programo kiel antaŭe.

La kvar grupoj estis: 1) *balkano.net* – ekplanis repaŝaron por balkanaj esperantistoj; 2) *lemul* – daŭrigis la projekton por retkursoj kaj aliaj lernrimedoj por lernontoj de Esperanto; 3) *Lingva ĉielarko* – paŝaro kiu prezentos diversajn aspektojn de lingvoj, kaj kiu servos kiel platformo por komunikado de lingva diverseco kaj lingva politiko de la Esperanto-movado por esperantista kaj neesperantista politiko; 4) *tejo.org* – daŭra evoluo de la TEJO-paŝaro por altri novajn agantojn kaj ĉiam havi freŝajn informojn en la TTT-ejo. La grupoj poste prezentis kelkajn rezultojn de la kunlaboro. Estis ankaŭ diskutito pri aliaj projektoj (ekz. *edukado.net*) kaj ideoj.

Ni loĝis kaj manĝis en komuna loĝejo por lernantoj. Tie ankaŭ kutime okazis la vesperaj programeroj. La klasĉambroj kaj komputilejoj troviĝis en gimnazio atingebla per dek-minuta piediro.

fotoj: Aaron Chapman



La partoprenantoj estis ĉefe el balkanaj landoj, kvankam ankaŭ Rusio, Kanado, Svedio, Germanio, Francio kaj Hungario estis reprezentitaj. Interesa novaĵo de tiu ĉi kurveno estis ke partoprenis ankaŭ neesperantistoj. Por ili estis tradukservoj kaj baza kurso. Kvankam komunikado ne ĉiam okazis tute glate, la sistemo estis ĝenerale sukcesa, kaj laŭdire, la kurso estis tre populara kaj vere instigis al rapida progreso kaj integriĝo en la grupo. Kelkaj neesperantistoj frue komentis ke ili iom timas la lingvan baron, sed la amika etoso tre baldaŭ forigis ĉiujn timojn kaj antaŭjuĝojn.



En la grupo estis vasta vario de teknikaj spertoj. La programo donis eblon al spertuloj por pliprofundiĝi kaj kunlabori, kaj samtempe instruis interretajn fundamentaĵojn al novuloj. Inter aliaj, troviĝis en la programo sesioj pri XHTML kaj stilfolioj, vikioj, tujmesaĝiloj, retaj forumoj, aspektigado kaj Photoshop, PHP kaj MySQL.

Malgraŭ tiom da laboro, junaj esperantistoj iel ĉiam trovas tempon por amuziĝi kaj festi (*Ni dormu post la seminario*). Ĉiu vespero ofertis diversajn programerojn por interkonatiĝo kaj amuziĝo. Ni grupe ludis, prezentis la proprajn landojn dum la internacia vespero, dancis, sportumis, okazigis lingvan festivaleton, trinkejumis, ktp.

En la programo estis ankaŭ tempo por promenado en Ĉaĉak, kaj eĉ por ekskurso al la montaro. Estas evidente ke la junula Esperanto-movado vige vivas kaj disradias energion konstante per novaj ideoj kaj amika kunlaboro. Mi esperas ke la inspiro nun povas firmenradikiĝi ankaŭ en Balkanio – la landaro kun neelĉerpbla homa forto kaj kun okuloj direktitaj al la estonteco.

Aaron Chapman

## UEA-membraro fine de 2001

Lando	IM	AM	sume	Lando	IM	AM	sume
Alĝerio	6	0	6	Panamo	3	0	3
Albanio	16	0	16	Papua Nov-Gvineo	2	0	2
Angolo	1	0	1	Paragvajo	1	0	1
Argentino	57	120	177	Peruo	6	25	31
Armenio	10	80	90	Pollando	125	381	506
Aŭstralio	55	150	205	Portugaliao	16	280	296
Aŭstrio	47	20	67	Reumio	2	0	2
Azerbajĝano	1	0	1	Ruando	1	0	1
Barejno	1	0	1	Rumanio	44	75	119
Belgio	164	550	714	Rusio	141	162	303
Belizo	1	0	1	Salvadoro	6	0	6
Benino	7	80	87	San-Marino	1	0	1
Bjelorusio	9	0	9	Sauda Arabio	1	0	1
Bolivio	1	0	1	Senegalio	1	0	1
Bosnio-Hercegovino	48	60	108	Singapuro	3	0	3
Brazilo	517	1074	1591	Sirio	1	0	1
Britio	193	506	699	Slovakio	31	115	146
Bulgario	76	140	216	Slovenio	18	142	160
Burundio	1	0	1	Srilanko	3	0	3
Ĉeĥio	88	880	968	Sud-Afriko	9	42	51
Ĉilio	5	11	16	Svedio	195	600	795
Ĉinio	94	1050	1144	Svisio	121	85	206
Danio	84	149	233	Tagikio	2	0	2
Dominika Respubliko	1	0	1	Tajlando	1	0	1
Ebura Bordo	2	0	2	Ĉinio (Tajvano)	3	0	3
Egiptio	2	0	2	Tanzanio	22	0	22
Ekvadoro	1	0	1	Togolando	50	250	300
Estonio	31	25	56	Tunizio	2	0	2
Filipinoj	1	0	1	Turkio	6	0	6
Finnlando	204	198	402	Ugando	1	0	1
Francio	675	420	1095	Ukrainio	48	156	204
Ganao	8	0	8	Unuiĝintaj Arabaj			
Germanio	555	644	1199	Emirejoj	2	0	2
Grekio	19	194	213	Urugvajo	8	30	38
Gvatemalo	8	0	8	Usono	371	430	801
Haitio	1	0	1	Uzbekio	8	0	8
Hinda Unio	23	70	93	Venezuelo	21	19	40
Hispanio	143	347	490	Vjetnamio	57	150	207
Honduro	2	0	2	Zambio	2	0	2
Hongkongo	4	0	4	Zimbabvo	1	0	1
				<b>Sume:</b>			
				<b>122 landoj</b>	<b>6428</b>	<b>14889</b>	<b>21317</b>

## Kiom da membroj havas UEA? Kiom da kongresanoj estos en Fortalezo?

Ĉi-apude estas la statistiko de la membraro de UEA en 2001. La tendenco de la IM malkreski daŭras, kvankam tre modere en 2001. Ĉi-jare ĝi estas, ĉiukaze, kontraŭita de la kresko de aligitaj membroj, tiel ke la saldo estas pozitiva. Estas tro da faktoroj, pro kiuj estas tre malfacile eltiri pozitivan juĝon el ĉi tiu pozitiva saldo, kiu ŝuldiĝas ĉefe al la abrupta kresko de aligitaj membroj en unu lando kaj al modestaj kreskoj en aliaj landoj.

Por kompletigi la bildon ni informu pri tio, ke la individuaj membroj de UEA la 1-an de julio estis 5365. Je la sama dato de 2001 ili estis 6127. Por havi fidindan ideon pri la suma nombro de individuaj membroj en 2002, tamen, estas necese atendi la UK-on dum kiu multaj membroj aliĝas. La nombro de la aliĝintoj por la 87-a UK en Fortalezo komence de julio 2002 estis 1312.

# Fervojistoj ĉi-jare en Bulgario

De la 1-a ĝis la 7-a de junio, en la bulgara urbo Plovdiv, okazis la 54-a internacia kongreso de fervojistoj-esperantistoj, kun 220 aliĝintoj.



La solenan inaŭguron partoprenis i.a. Ljubomil Ivanov, vicministro pri transporto kaj komunikadoj; Ruben Rusev, vicurbestro de Plovdivo; Gilbert Schit, prezidanto de FISAIC; Hristo Ivanov, direktoro de la fervojista administrejo en Plovdivo; Romano Bolognesi, prezidanto de IFEF, kaj István Gulyás, vicprezidanto de IFEF.

En salutmesaĝo de la urbestro estis dirite: *La elektita kongresa moto "Unuigita Eŭropo bezonas Esperanton" estas kategoria sugesto al la mondo, ke la lingva komunikado de la popoloj kiel baza formo de komunikado inter ili, jam delonge atingis sian universalan kaj demokratian formon: Esperanton, kreitan kun la simpla celo – proksimiĝo de la nacioj kaj paco sur nia planedo.*

La prezidanto de BEA Petro Todorov post sia varma kaj kora bondeziro al la kongreso dekoraciis per la ordeno de BEA i.a. la vicministron de Transporto kaj komunikadoj, kaj la prezidantojn de FISAIC kaj IFEF.

Dum la kongreso okazis fakaj prelegoj kaj laborkursidoj, duontaga ekskurso al la renesanca urbeo Koprivštica kaj al rozĝardenoj, kiuj produktas la faman bulgaran rozan oleon. Vespere oni spektis la teatraĵojn



La invento de la jarcento de Julian Modest, brile prezentitan de Bulgara Esperanto-Teatro. Okazis bankedo kun balo, arta kaj amuza vesperoj kaj tuttaga ekskurso al la Monaĥejo Rila.

La venonta kongresa urbo de IFEF estos Dresdeno (Germanio), kandidatoj por dommastraj la postajn kongresojn estas Hungario, Rumanio kaj Ĉinio.

Petko Arnaudov

**FOTOJ:** Supre: Amikece parolantaj kongresanoj en la salono Zamenhof de la hotelo Sankt Peterburg atendas la komencon de la solena malfermo (foto: Jean Ripoché). Meze: la partoprenantoj (foto: Laurent Vignaud). Sube: Parto de la IFEF-estraro kaj de la lokaj kaj fervojaj eminentuloj dum la malfermo de la 54-a IFEF-kongreso (foto: M. Feifichová).

## Kio estas Humanitas?

La 6-an de aprilo 2002 estis en Kroatio fondita Ligo Humanitas. Ĝi havas jam sesdekon da membroj. La ligo celas internan praktikadon kaj internacian popularigadon de homamo, homeco, klereco, civilizeco kaj bona gusto. La latinlingva vorto *humanitas*, prenita por la nomo de la ligo, tradicie esprimas ĉiujn tiujn signifojn.

Temas pri idealoj de la humanisma movado, naskiĝinta en Eŭropo en la 14-a/15-a jarcentoj. La unuaj humanistoj disvastigadis humanismon en la latina lingvo (la tutetropa). Du jarcentojn poste la elstara ĉeĥa humanisto J. A. Komenský proponis konstruadon de pli oportuna (pli simpla, pli facile lernebla) universala lingvo por pere de ĝi disvastigi humanismajn idealojn tra la tuta mondo. Nur du-tri jarcentojn poste la universala lingvon, pri kiu revis Komenský, sukcese konstruis Zamenhof.

Zamenhof provis konstrui ankaŭ universalan, por la tuta mondo akcepteblan religietikon (hilelismon, homarantismon), sed tiukampe li estis malpli sukcesa.

En la hodiaŭa mondo aktivas multaj naciaj humanismaj organizaĵoj, kaj ne

malmultaj internaciaj. Tamen, nur Ligo Humanitas celas plivastigon de la humanismaj idealoj krom en naciaj, ankaŭ en la neŭtrala internacia lingvo Esperanto. La monata revueto de la ligo aperas naciskale, por komenco, en la kroata lingvo, sed internacia eldono aperas en Esperanto. En proksima estonteco la ligo planas agi antaŭe en aliaj naciaj lingvoj, sed la pontolingvo restos Esperanto.

Aliĝoj al la ligo kaj abonon al la revueto eblas laŭ jenaj kontaktadreso: Mato Spekuljak (por Ligo "Humanitas"), Ostarijska 8, HR-10000 Zagreb, Kroatio; rete: [adhumanitatem@yahoo.com](mailto:adhumanitatem@yahoo.com). La TTT-ejo de la ligo havas jenan adreson: <http://www.geocities.com/adhumanitatem>

Mato Spekuljak



# Recenzoj



## Originalaj noveloj de 30 verkistoj

Mondo, red. Tomasz Chmielik, Georgo Handzlik kaj Sten Johansson. Bielsko-Biała: Eldonejo Kleks, 2001. 216p., bind. € 16,50, triona rabato ekde tri ekzempleroj.

34 originalaj esperantlingvaj noveloj de 30 verkistoj el 19 landoj, plejparte eŭropaj, sed kun kelkaj kontribuoj el la Amerikoj, Afriko, kaj Aŭstralio. La noveloj estas ĝenerale nelongaj, kun kelkaj esceptoj, kaj estas bone elektitaj kaj bone verkitaĵ. Bedaŭrinde, abundas komposteraro, kvankam nur unu-dufoje ili nekompreneblas la legadon. Tamen pli adekvata provlegado estas tre dezirinda.

Mi rekonis kelkajn el la noveloj el la Belartaj Konkursoj de UEA, kiujn kiel juĝisto en la proz-literatura fako mi jam antaŭe legis kaj multe ŝatis. Plezurigas ke ili nun haveblas en libroformo. Laŭ mia propra gusto, elstaras inter la noveloj *Familio Pork* de Jorge Camacho; *La islanda vortaro* de Ronald Gates; *La reveno* kaj *Renkontiĝo kun la morto* de Zora Heide; *Vivo kaj morto de Neologismo* de Sten Johansson; *La pluvo en Censtohovo* de Lena Karpunina; *Heinz estas mi* de Trevor Steele. Nur tre malmultaj el la noveloj ŝajnas al mi neindaj, pro sia propagandemo pri Esperanto, pri ekologio, pri moraleco, k.a. En literatura kolekto oni ne anticipas esti surŝutata per senkaŝa propagandado pri iu ideologio. Sed facilas ne relegi ilin, kaj anstataŭe refrandi la literaturajn gemetojn.



Nu, neniu el la noveloj estas Nobel-premiindaĵo. Tamen, pluraj el ili spegulas la altan kvaliton de la plej bona esperantlingva verkado. Mi ne povas ne menci, tiurilate, veran gemon, *Vivo kaj morto de Neologismo* de Sten Johansson, kiu ne nur abunde ridigas la leganton, sed sukcesas ankaŭ pensigi. Sed tio ja estas la esenco de vera komikaĵo, ĉu ne?

Aliflanke, *Heinz estas mi* de Trevor Steele estas eble la plej pensiga el la noveloj. Estas neklare, verŝajne laŭintence, ĉu la aŭtoro celas priskribi spertojn de renkontiĝo kun reenkarigiĝo pasintaj kaj estontaj – vivdoto de kelkaj el la mioj kiujn li renkontas inkludas nin supozu tiun interpreton; aliflanke, aliaj aludoj pensigas pli pri la multeco de la personecpartoj, kiuj sin montras ekstremforme en kazoj de multpersoneco troveblaj en psikiatraj studoj, kaj en la konsultocambroj de psikanalizistoj. Estas dirite en la verko ke la verkanto ne kredas je karmo, do ni rajtas elstreki tiun hipotezon. Nu, ĉu ni ja rajtas trovi en ĉi novelo la

vidpunkton de Trevor Steele mem, kaj ne nur literaturan fikciaĵon? Mi emas pensi pri tio ke Trevor kutime bazas siajn novelojn sur propraj vivspertoj, malmulte aŭ tute ne kaŝanĝitaj. Negrave kiel oni konkludas, la novelo estas, kiel mi jam diris, pensiga kaj pripensinda.

Donald Broadbribb

## Bela ponto al kroata beletra

Barkoj el akvo. Elektitaj Kroataj Noveloj 1970-1995. Elektis Julijana Matanović. Redaktis Ivan Spoljarec. Eldonis Medunarodni centar za usluge u kulturi, Zagreb, Kroatio 1998. 246 paĝoj, broŝurita. € 10,20

Kroata kolekto *Barkoj el akvo* sukcese albirdiĝis en la finna havenurbo Turku. Temas pri noveloj el inter la jaroj 1970-1995 kaj eldonitaj en Zagreb en 1998 sub la menciita titolo. Tuj dum la unua foliumado leganto facile rimarkas fluan lingvouzon de la tradukintoj. Tio allogas por pliprofunda konatiĝo. Julijana Matanović kompilis multflankan, profesiece skribitan enkondukon, kiu lumigas la verkadon de la plumistoj por la libro kontribuistoj.

Oni devas konstati, ke Kroatio estas malproksima kaj nekonata, se ni rigardas la aferojn el Finnlando. Tial kompreneble estas ĝojige utiliĝi jenan novan publikacion, kiu servas kiel prope-deŭtika ponto al la literaturo de tiu ĉi lando. Entute dudeko da verkistoj ricevis spacon inter la belaj kovriloj de la beletra produkto, de mi ŝatata, modela ekzemplo de mallonga prozo libroforme naskita en Zagreb.

Iuj surskriboj de kelkaj noveloj vekas pozitivajn asociigojn, ili estas kvazaŭ bunta ĉielarko de kolora vivo, aminda kaj

spertinda ĉiurilate. El lingva vidpunkto estas kaj facilaj kaj cerbumadon postulantaj kreaĵoj. Tial eblas rekomendi la libron ankaŭ al komencantoj, kiuj povas per tiu ĉi legaĵo pliprofundigi sian lingvoscion.

Mirinde estis al mi tiel ofte halti dum legado kaj ekpensi proprajn spertojn similajn al kelkaj detaletoj en la teksto. Vere oni povas paroli pri dialogo inter beletristoj kaj leganto. Tia fekunda kaj fruktodona tereno estas ege signifa. Tial la libro akompanas min en la surtuta poŝo, por ke mi povu gustume digesti ĉion ripoje en aŭtobusoj kaj trajnoj. Estas malfacile malmargi speciale kaj aparte iun novelon el la jena nuntempa kroata literatura fonto, sed citante la vortojn de Cezaro Rossetti *Kredu min sinjor(in)o* mi simple akcentas la fakton, ke indas konatiĝi kun la prozaĵoj liveritaj al la tutmonda legataro el la Zagreba Internacia Kultura Servo.

Restis al mi nur sopiri etajn menciojn pri la tradukintoj, al kiuj ni multon ŝuldas dankeme. Legadon ĝuon deziras

Jorma Ahomäki





## Pledo por la gepatraj lingvoj vekas atenton

Okaze de la Eŭropa jaro de lingvoj 2001 la broŝuro *Brilu ĉiu lingvo samrajte!* de László Gados eldoniĝis krom en Esperanto ankaŭ en la hungara, itala (kiel tema numero de *L'Esperanto*), en la franca kaj en la germana. La plurlingva eldono okazis laŭ la koncepto de la verkinto. La esperantistoj povas kunagi trans lingvaj baroj – samrajte.

**B**rilu ĉiu lingvo samrajte faras distingon inter gepatraj lingvoj kaj fremdaj lingvoj: por ĉiu homo ekzistas la gepatra lingvo, kiu por ĉiu estas same grava sendepende de tio pri kiu lingvo temas, ĉu pri granda aŭ malgranda.

Surbaze de tiu ĉi konstato László Gados analizas la lingvan reĝimon de Eŭropa Unio kun la kreskanta signifo de la angla lingvo. Li konstatas ke sendiskriminacia lingvo ekzistas en la formo de Esperanto, kiu povas funkcii protekte por la gepatraj lingvoj.

La broŝuro estis distribuata inter multaj eminentuloj.

Interalie la Hungara Scienca Akademio ricevis kompletan kun ĉiuj kvin lingvaj versioj. Sekve László Gados plurfoje estis invitata verki artikolojn aŭ paroli pri

la ideoj prezentitaj. Foje aperis miskomprenoj pri la enhavo, kiel ekz. en recenzo en la hungara prilingva gazeto

*Édes Anyanyelvünk* (n-ro 1/02), sed la temo estis serioze traktita kaj la verkinto havis okazon reagi per artikolo pri la eŭropa lingvosituacio.

Ankaŭ en aliaj landoj oni uzis la tekston por vekii intereson pri la Esperanto-movado kaj strategiajn debatojn inter esperantistoj.

La libroservo de UEA vendas *Brilu ĉiu lingvo samrajte!* (EUR 3,30) kaj la germanan *Allen Sprachen eine Zukunft!* (EUR 3,00).

La teksto troveblas ankaŭ interrete ĉe ligo al la retejo de Ulrich Matthias ĉe: <http://groups.yahoo.com/group/lingvotagoj/links>

(amr)



László Gados kun la kvin-lingva kolekto de la verko.

## Vojaĝo en Esperanto-lando

Tiel nomiĝas la eminenta verko de akademiano Boris Kolker, ĵus eldonita de UEA.

La libro apartenas al malofta ĝenro de perfektigaj kursoj de Esperanto, kiu pro klaraj kialoj estas multe malpli oftaj ol la startigaj lerniloj. Aparte ĝin elstarigas tio, ke ĝi estas samtempe gvidlibro pri la Esperanta kulturo, donas ampleksajn sciojn pri la E-movado kaj la praktika aplikado de la lingvo.

*La ambiciaj celoj de tiu ĉi neordinara lernolibro estas instrui kreaĵon regadon de la literatura lingvo kaj kreskigi emocijn ligitecon al Esperanto –* skribis Boris Kolker, prezentante la libron. Temas pri la dua eldono de la libro, radikale referita kaj internaciĝita. La instruado okazas kun la uzo de verkoj de Ludoviko Zamenhof, Claude Piron, István Nemere, Julio Baghy, John Wells, Marjorie Boulton, Albert Goodheir, Emilia Lapenna, Cezaro Rossetti, Lorjak, Kalomano Kalocsay kaj dudeko da aliaj konataj kaj ne tre konataj, sed interesaj aŭtoroj.

La tekstojn akompanas E-temaj fotoj, zorge elektitaj el la foto-arkivo de la Centra Oficejo.

La libro akreblas en la Libroservo de UEA. Kelkaj lecionoj el la libro troviĝas en la reto: <http://www.esperanto.mv.ru/Vojaxgo/index.html>.

Boris Kolker: Vojaĝo en Esperanto-lando. Perfekta kurso de Esperanto kaj gvidlibro pri la Esperanta kulturo. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2002. 291 p. Prezo: 18 EUR. Triona rabato ekde 2 ekzempleroj.

## Nova Esperanto-voĉo premieris

La sopranulino Liisa Viinainen, nask. 1972, premieris per sia unua opera prezento en Esperanto dum la Vintraj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando en Mikkeli la 23-an de marto 2002.

Ŝi kreis por si mem la unuvirinan ŝoporon *Duraj sortoj Napolaj* kun itajlaj operetkantoj (Verdi, Rossini, Puccini kaj Donaudy), esperantigitaj de Anja Karkiainen, Giorgio Denti kaj Riitta Härmäläinen. Prezentigis ankaŭ rakontkongreue iom modifitaj *Ho suno mia kaj Sankta Luĉia*, kies tradukintoj ne estas konataj. Akompanis la pianistino Hanna-Leena Kalaoja.

La tragikomedija rakonto komenciĝas kiam la feliĉon de geedza paro en Napolo, la sopranulino Rozina kaj la baritonulo Alfredo, frakasas alveno de kamentubisto. Ties voĉon kontralte kantas Liisa, same kiel la ceterajn rolojn inkluzive de la tenorula rolo de Manolo, kiu enamiĝas al Rozina. Ne sufiĉas la reciprokaj sentoj por alvenigi feliĉan finon. Temas ja pri opero.

Liisa memleke ekuzis Esperanton somere 1999 cele al trovo de nova hobia, por havi novajn kontaktojn ekster siaj kutimaj muzikaj rondoj. En intervjuo (*Esperantotehiti - Esperanta Finnlando 1/02*) ŝi rakontas pri la motivoj ekstudati la internacian lingvon: "Esperanto pli facile vojaĝus kun mi en la mondo ol ekz. trikaĵo". Printempe ŝi translokiĝis al Kolonjo en Germanujo. "Estas la tempo iri pluen, al nova instruisto", ŝi klarigis en la intervjuo.

La operan prezenton videble ĝuis la 50-kapa aŭskultantaro en Mikkeli kaj

pluraj jam esprimis siajn esperojn respekti la kantadon de Liisa ie en Esperantujo.

(amr)



Hanna-Leena Kalaoja kaj Liisa Viinainen post la koncerto. Foto: Pentti Makkonen.

## Laste aperis



**LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insiĝoj k.s. 19% por la aldovoral imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokotaj (minimume 2,25 eŭro). Antaŭdankon pro via mendo! Ĉisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>**

**A.S. Puŝkin. Rusa poezio en tradukoj de Sergej Rublov.** El la rusa tradukis S. Rublov. Jaroslavl: Remder, 2002. 467p. ISBN 5 94755 008 3. 21cm. Poezia verko de la rusa nacia poeto; inkluzivas i.a. la tutan versomanon "Eŭgeno Onegin" kaj fragmentojn de "Boriso Godunov". € 15,00

**Ĉielarka estonto.** Carmel Mallia. Berkeley: Bero, 2002. 111p. ISBN 1 882251 34 2. 21cm. Historia romano kun malta fono. € 12,90

**Documente Esperanto 5.** R. Centassi, H. Masson, L.L. Zamenhof. En la rumanan trad. I. Onet kaj S. Vlad. Cluj-Napoca: Dokia, 2001. 28p. ISBN 973 9074 79 0. 20cm. Pri la origino de E-o, interna ideo k.a. € 2,40


**Du lingvoj. Kantoj kaj poemoj.** Bruna Ŝtono (pseud.). Antaŭparolo de V. Samodaj. Moskvo: Impeto, 2001. 191p. ISBN 5 7161 0093 7. 20cm. Poemaro de la rusia (soveta) movada bardo Mikaelo Bronŝtejn. € 9,90

**Enkonduko en budhismon.** Yamaguti Simiti. Nagoya: JBLE, 2002. 112p. ISBN 4 901651 00 5. 21cm. Eleganta kaj klara prezento de unu el la grandaj religioj, originale verkita en Esperanto. € 12,00

**Kantoj de l' silento.** Zora Heide. El la kroata trad. L. Borčić, I. Borovečki, E. Lapenna. Moskvo: 1984. 135p. 21cm. Dulingva: E-kroata. € 5,40

**Konstruu vian domon.** Gilbert R. Ledon. Campos do Jordao, SP: La aŭtoro, 2002. 39p. 22cm. Teknikaj kajeroj n-ro 6. Ilus. Baza faka verko, kun multaj desegnaĵoj kaj zorga elekto de terminoj. € 4,80

**Krias la silento.** István Nemere. Berkeley: Bero, 2002. 177p. ISBN 1 882251 35 0. 21cm. Psikologia romano pri spertoj de Nobel-premiito. € 15,90



aliaj lingvoj trad. Daniel Kolker. Tel-Aviv: Cabro, 2002. 56p. 21cm. Ĉefe rusaj (inkluzive de pluraj laŭ Puŝkin), sed ankaŭ israelaj kaj alilandaj kantoj. € 3,00

**Ŝak-vojo. Noveloj.** Christian Rivière. Nantes: La aŭtoro, 2001. 88p. ISBN 2 9514747 2 5. 19cm. Dek sep mallongaj skizoj kaj rakontoj, bonstilaj, socie engaĝitaj. € 10,20

**Teozofio. Enkonduko en supersensajn mondekonon kaj homodestinin.** Rudolf Steiner. El la germana tradukis Willy Nüesch. Berno: La tradukinto, 2002. 149p. 21cm. € 18,00

**Ulica Zamenhofs. Razmowa z wnikliwym twórcy języka esperanto.** Roman Dobrzyński. Bielsko-Biała: Kleks, 2001. 286p. ISBN 83 7194 377 6. 20cm. En la pola. Interparolo kun la nepo de la kreinto de la lingvo Esperanto. € 7,50

### KOMPAKTDISKOJ

**Bela revo.** Kantas Anjo Amika. El div. lingvoj trad. Rados, Silber k.a. La Chau-de-Fonds: LF-Koop, 2002. 72 min. Diversarĝita (hungaraj, italiaj k.a) kaj religiaj kantoj kun orgena akompano de M. Teleki. € 22,50

**Jubilea koncerto en kastelo Herzberg am Harz.** Kantas: K. Kudlikova, A. Wiesmann (soprano), M. Smyčka (baritono), A. Hofmann (tenoro), W. Lange (baso). Piano: U. Matke kaj J. Zimmel. El div. lingvoj trad. J. Giessner kaj J. Kofínek: 2001. 55 min. Kun tekstolibreto. Klasikmuzika koncerto por la 25-jariĝo de la E-Societo Südharz, kun verkoj i.a. de Beethoven. Lehar kaj Mozart. € 15,00

**Tom Jobim en Esperanto. Brazila kolekto.** Kantas Alejandro Cossavella, Flávio Fonseca, Silvana Albuquerque; solgitaro Marcelo Lefetá. El la portugala trad. B. Wennergren, A. Koenig, J. Salles, F. Wechsler k.a. Brasilia: VER, 2002. 31 min. Deko da popularaj kantoj de la fama brazila komponisto Jobim. € 12,00



## Loke

● **PARAGVAJO:** Deolinda Vera Lopez kaj Gloria de Insfran invitis karavanon de esperantisto el Rio-de-Janeiro (membroj de Kultura Kooperativo de Esperantistoj) por helpi en la starigo de kurso de Esperanto en Asunciono. La evento (13-20 apr 2002) estis sukcesa kaj espereble baldaŭ fondiĝos Paragvaja Esperanto-Asocio. Post intervjuo en Radio eĉ la japana ambasadoro Furokawa venis al la prelego kaj montrigis ke li mem, poligloto, intencas prestiĝi la Esperanto-Kurson per sia ĉeesto.

● **KARAGMATATUBO:** Omaĝe al Zamenhof, en Karagmatatubo (norda marbordo de provinco San Paŭlo en Brazilo) Symbilde Schenk Ledon, brazila ĉefdelegito kaj la vic-urbestro de Karagmatatubo José Pereira de Aguiar, inaŭguris la 28-an de aprilo 2002 ZEO-n sur la placo Esperanto. La eventon partoprenis lokaj kaj regionaj esperantistoj kaj gravuloj de la urbo.

● **TOGOLANDO:** La 8-an de junio 2002 okazis la dua komitatunskudo de Unuiĝo Togolanda por Esperanto (UTE). La 34 komitatanoj adidis raportojn de sekcioj de la landa asocio, aprobis la financon raporton kaj priprenis farenadojn por plibonigi la laborojn de la asocio. Estis klarigita la strategia plano de UEA kaj starigitaj komisionoj por okazigo de la Zamenhofesto kaj por funkciado de la futbalteamo. Poste okazis diskuto pri revarbado de la malnovaj esperantistoj.

● **SVEDIO:** La svedaj esperantistoj kongresis dum la unua maja semajnfino en Västerås. La kunveno komenciĝis per podia diskuto *Lingvo - via homa rajto*, kiun enkondukis universitata docento Mikael Parkwall. La kongreso dediĉis sin ĉefe al organizaj demandoj. El la jarraporto oni eksciis, ke la membronombro en 2001 kreskis, post multaj jaroj de malkresko. Pro la malgrandiganta rolo de kluboj, komuna kun aliaj svedaj organizoj, okazis diskuto pri ŝanĝo en la statuto, tiel ke la individua membro ricevos rektan influon al la agado de SEF.

● **EXPOLINGUA 2002:** La ĉiujara tradicia lingvofoiro okazis inter la 11-a kaj la 14-a de aprilo en Madrido. La organizanto senpage disponigis al la Hispana E-Federacio ĝiĉeton de 6m², kun meblaro kaj elektro, kie dum kvar tagoj la publiko estis informata pri Esperanto. Deforis madridaj samideanoj kaj estis prezentita la vidbendo Mazi kaj flugfolio pri Esperantaj TTT-ejoj, simila al la informilo "Esperanto-Panorama" ([www.esperanto-panorama.net](http://www.esperanto-panorama.net)). Esperanto denove vekis intereson, surprizon, kaj eĉ rifuzon - kial ne diri - inter la publiko; sed estas ja

pozitiva atingo, ke serioza entrepreno kia *Fundacion Actilibre* konsideras Esperanton inda je ĉeesto tiukadre.

● **MALBORK:** La 28-an de aprilo 2002 en la skvaro Esperanto de Malbork (Pollando) okazis solena inaŭguro de la memorŝtono Ruslando. Halina Gorecka, eldonanto de *La Ondo de Esperanto*, inaŭguris la memorŝtonon kaj metis florojn al la monumento Zamenhof, kiu situas en la skvaro. Dum la solenaĵo ĉeestis la urbestro

## Fake

● **PASPORTA SERVO:** informoj pri tiu unika internacia gastiga servo haveblas en la hejmapaĝoj <<http://www.esperanto.nu/ps/>> <<http://www.esperanto.net/ps/>>. Kio ĝi estas, kiel ĝi funkcias, kie eblas aĉeti la adreslibron tpe. Vi trovas ankaŭ aligilojn en diversaj formatoj.

● **BUDHANOJ:** Estas interkonsentita kunveno dum la baldaŭna Universala Kongreso de E-o (Fortaleza, Brazilo, 3-10 de aŭgusto 2002), kie oni planas refondon de Budhana Ligo Esperantista. Esperantistaj budhistoj aŭ interesigantoj bv. kontakti la iniciatinton YAMAGUTI Sin'iti <[syam-z@wa2.so-net.ne.jp](mailto:syam-z@wa2.so-net.ne.jp)>, <http://www13.u-pa.ge.so-net.ne.jp/wa2/syam-z/budhismo.indekso.html>.

● **E-TIPAROJ:** Por uzantoj de komputiloj Apple Macintosh, eblas elŝuti centradon al literatiparoj kiujn Donald Broadribb (Aŭstralio) speciale preparis por unikoda



kaj vicurbestro (kiu parolas Esperanton), ĵurnalistoj kaj esperantistoj el Pollando, Ruslando kaj Germanio. Junulara dancensemblo *Co to* kaj infana kantgrupo *Amanitoj* koncertis antaŭ la kunvenintoj, inter kiuj estis multaj urbanoj.

● **BUSANO:** La 30-an de majo en la centro de Busano, suda Koreio, finiĝis la unua kurso de Esperanto. La finan ceremonion partoprenis 25 esperantistoj kaj kelkaj neesperantistoj. 17 kursanoj finis la dumonatan kurson kaj Lee Chong-yeong, vicprezidanto de UEA, ĉeestis por gratuli la kursanojn kaj por prelegi pri la lingva problemo en nia mondo. La kursanoj datrigos la lernadon ĉiujade kaj la nova kurso por komencantoj okazos ĉiutarde.

uzado ĉe <http://homepage.mac.com/tipsit/kompleto.sit>. La plena pakajo okupas 4.3 MB. E-tiparoj estas elŝuteblaj ankaŭ ĉe: <http://www.randomly.com/pub/mactiparoj.zip>. Preskaŭ 400 pliaj, por kiuj sufiĉas elŝuti la Tiparan instalilon, estas riceblaj ĉe: <http://www.randomly.com/pub/tiparoj.exe>.

● **DISSENDOLISTOJ:** Ekzistas nun pli ol 200 diversaj esperantistaj dissendo-listoj el 40 landoj, pri multaj temoj, jen bonaj lokoj por trovi kunlaborantojn pri via preferata temo. Kaj se vi ne trovos, kreu novan diskut-liston! <http://puil.org/net/dissendo>

● **INTERLINGVISTIKO:** La konata rumana interlingvisto d-ro Constantin Dominte el Bukareŝto aperigis 4-paĝan recenzon pri la festlibro por Detlev Blanke (Fiedler/Liu, Interlingvistikaj studoj, 2001) en la grandformata kaj prestiĝa scienc revuo *Caiete critice* (1-2/2002). La revuo estas eldonata de la prezidanto de la Rumana Akademio de Sciencoj.

● **KOMENCANTO:** La internacia revuo *Komencanto* havas novan retadreson: [komencanto@r6.ru](mailto:komencanto@r6.ru). Bv ne uzi la malnovan. La redaktoro Viktor Kudrjavcev atingebblas ankaŭ per telefono 7 - (3432) - 114250.

● **INTERGAZETO:** aperis regula legaĵo por viaj lernantoj *Intergazeto*. Mallongaj novaĵoj pri la mondo en Esperanto per retpoŝto aŭ poŝtelefonaj mesaĝetoj (SMS). Aligo ĉe [inform@index.hu](mailto:inform@index.hu). Ĝi helpas viajn lernantojn uzi la internacian lingvon en la praktikoj.

● **LERNI RETE:** Pri la interaktiva reta lingvokurso ĉe [esperantoLand.de](http://esperantoLand.de) atentigis la germana novaĝenteĝo DPA en notico de la 13-a de junio. La informo aperis sur la retpaĝoj de kelkaj grandaj gazetoj kaj ĉe la interreta servoprovizanto [www.web.de](http://www.web.de).



## Persone

● **JANSEN:** La Universitato de Amsterdamo elektis Wim Jansen docento pri Interlingvistiko kaj Esperanto. Li estas postsekvanto de eksterordinara profesoro Marc van Oostendorp, kiu forlasis la katedron en 2001. La nomumo estas efektiva de la 1-a de februaro 2002. Estas formala enfunkulata tasko por unu kaj duona tago ĉiusemajne. La lekciprogramo pri Interlingvistiko kaj Esperanto kiel libere elektelebla fako ene de la subfakultato pri teoria lingvistiko komenciĝos en septembro 2002 kaj daŭros dum la unua semestro de 2002-2003. Wim Jansen, 53-jara nederlandano, magistrigis en inĝenierado kaj en kompara lingvistiko kiel specialisto pri la eŭska lingvo. Post internacia inĝeniera kariero li nuntempe laboras kiel liberprofesia docento de lingvoj kaj verkisto, precipe en la nederlanda kaj angla lingvoj, kaj ĉefe pri la eŭska kiel moderna ekzemplo de etna planlingvo.

**FUMERO:** La 29-an de majo la kuba gazeto *Juventud Rebelde* aperigis tutpaĝan intervjuon al Alberto García Fumero, Sekretario por Ulligo de Esperanto ĉe Kuba Esperanto-Asocio. La intervjuo, kun foto kaj titolo *Un Puente para la Comunicación Universal* (Ponto por Universala Komunikado) tuŝas diversajn flankojn de Esperanto, inter ili avantaĝojn por senpera komunikado, evoluon, rolon de la Akademio, literaturon en Esperanto, ktp. Aparta mencio estas pri la venonta UK en Fortaleza kaj preparoj por la 6-a Tut-Amerika Kongreso, okazonta en Havano en 2004.

● **BAKKER:** La 27-an de aprilo 2002 estis honorigita per reĝa kavallira medalo, pro sia pli ol 20-jara laboro por Esperanto en Afriko, Hans Bakker, komitatano de UEA kaj ties komisiito pri Afrika agado. Hans Bakker konatiĝis en Esperantio kiel aganto favore al la t.n. tria mondo. La medalon li ricevis de la urbestro en la urbodomo de Amsterdamo. Pri la evento raportis pluraj



Esperantist Hans Bakker helpi school in Afrika aan gebouw

nederlandaj gazetoj. Sur la bildo: artikolo pri Hans Bakker en *Amsterdams Stadsblad*.

## Oficiala informilo



### PATRONOJ DE TEJO 2002

**Danio:** Eliza Kehlet. **Hungario:** Flóra Szabó-Felső; Péter Pál Denke.

### SOCIETO ZAMENHOF 2002

**Hungario:** Péter Pál Denke. **Japanio:** Akira Morita. **Nederlando:** Simon P. Smits.

### DONACOJ 2002 (EUR)

#### ĝis la 31-a de majo

**Afrika Kapitalo:** Nederlando: F.D. van Zoest 11.50. **Togolando:** K. Gbeglo 135.20. **Sumo ĉi-jara:** 216.00.

**Fondaĵo Afriko:** Belgio: A. Geelen 8,00. **Italio:** R. Corsetti 10,00. **Nederlando:** H. Bakker 20,00. **Svedio:** J. Hammarberg 32,55. **Sumo ĉi-jara:** 331,22.

**Fondaĵo Ameriko:** Finnlando: R. Pyhäälä (Addano) 100,00. **Nederlando:** S.P. Smits (Addano) 125,00. **Sumo ĉi-jara:** 2051,72.

**Fondaĵo Azio:** Britio: Anonima 208,67. **Sumo ĉi-jara:** 2449,67.

**Konto Espero:** Egiptio: R. Lecat (Lingvo de Paco = LdP) 20,00. **Japanio:** E. Miyoshi (LdP) 853,97. **Nederlando:** N. Kuiterman (LdP) 50,00. **Sumo ĉi-jara:** 4845,28.

**Ĝenerala Kaso:** Britio: A.H. Gardner 12,82; C.G. Maddox 4,85. **Nederlando:** F.D. van Zoest 11,50. **Svislando:** H. Meier 15,12; F. Mellini 5,50; B. Zeuggin 2,06. **Sumo ĉi-jara:** 1379,32.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

### GAZETARAJ KOMUNIKOJ:

la sistemo de la Gazetaraj Komunikoj de UEA estas reorganiziita sur nova komputilo, kiu aŭtomate dissendas la gazetarajn komunikojn al gazetoj, kies retadresoj estas en la adresaro de UEA, kaj al la homoj, kiuj petis ilin tra la paĝoj [www.uea.org](http://www.uea.org) aŭ alimaniere en la pazinteco. Ĉar estis kritikoj por plurlobla ricevado de la komunikoj tra la listoj fare de abonantoj de pluraj listoj, la gazetaraj komunikoj provizore ne estas aŭtomate sendataj. La individuaj membroj, kiuj deziras rekte ricevi la gazetarajn komunikojn, bv. sendi mesaĝon al <[gazetaraj.komunikoj-reqest@co.uea.org](mailto:gazetaraj.komunikoj-reqest@co.uea.org)> kun nur la vorto *subscribe* en la temlinio kaj nenio (eĉ ne la subskribo) en la korpo de la mesaĝo.

### LECIONOJ PRI LA ITALA LINGVO:

Senpagaj lecionoj pri la itala lingvo, verkita de E-o, haveblas retpoŝte ĉe: Massimo Ripani <[Xenoitaly@hotmail.com](mailto:Xenoitaly@hotmail.com)>.

## Anoncetoj

**1 vorto = 1 internacia rpk (€ 0,75). Ni ne respondacas pri la enhavo. Ripeto ne rajtigas rabaton. Pri korespondopetoj zorgas ankaŭ Korespondanta Servo Mondskala, B.P.6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio, [www.multimania.com/kosomo](http://www.multimania.com/kosomo).**



### AŬDO-VIDA KONVERSACIA KURSO

de Esperanto por progresintoj de Stano Marček nun haveblas ankaŭ per kompaktdisko, uzebla per ajna komputilo (PC kaj MAC, kun MP3, JPG kaj PDF-legiloj). Pliaj informoj ĉe la aŭtoro (kontaktoj en la kolofono).

**MI SENDAS SENPAGE** per la reto mian libron "La Nova Paradigmo en Psikologio" (tradukitan de Argent-EJO el la hispana). Petu al: [rufegon@mxl.cablemas.com](mailto:rufegon@mxl.cablemas.com). Aĉetebla librofirme ĉe UEA kaj ELNA (donacata de la aŭtoro al ambaŭ Esperantejo).

**DEZIRAS INTERŜANĜI** vid- kaj sonbendojn por levi sian lingvan nivelon: S-ro Dieter Rooke, Aussere Klus 14, CH-4702 Oensingen, Svislando.

**ESPERANTA POŝTKARTO:** Se vi volus ricevi poŝtkarton kun apuda stampo oficiale eldonita okaze de Esperantaj Tagoj de Staszów en Pollando, bv. skribi al [andreo@staszow.com](mailto:andreo@staszow.com). Sur karto estas granda Esperanta flago kaj mapo de Pollando kun la urbo Staszów kaj apuda stampo kun la teksto XIII Esperantaj Tagoj de Staszów.

**POŝTKARTOJN EL LA TUTA MONDO** dez. ricevi la asocio La Verda Stelo - Esperanto 94, okaze de la Festo de la asocioj de Choisy-le-Roi la 21-an de septembro 2002. La adreso: La Verda Stelo - Esperanto 94, 3/507 rue Pablo Picasso 94600 Choisy-le-Roi, Francio. Okazos konkurso inter la diversaj asocioj, estas do okazo montri la vivon de Esperanto!





Partoprenantoj de la 18-a Internacia Somera Esperanto-Universitato en Veliko Tarnovo, Bulgario. foto: Petko Arnaudov

## Bulgara Esperanto-asocio

La sidejo estas propra, ekzistas biblioteko, nuntempe translokiĝanta kaj reordigata. Ekzistas ankaŭ libroservo ĉe la asocia sidejo. Aperas la bulteno *Bulgara Esperantisto*, eldonata ĉiun trian monaton, 20-paĝa. Retadreso: [bea@interpres.org](mailto:bea@interpres.org); hejmpaĝo: <http://www.interpres.org/bea>.

La membroj estas 140; ekzistas 52 lokaj grupoj kaj 6 Esperantaj domoj de kulturo. La estraro estas kvinkapa. La landa kongreso okazas ĉiun jaron kaj daŭras 3 tagojn. UEA-komitatano estas Mariana Evlogieva, [mrvpl@interpres.org](mailto:mrvpl@interpres.org). Ĉefdelegito: Petko Arnaudov ([petkoa@mbox.digsys.bg](mailto:petkoa@mbox.digsys.bg)). Ne ekzistas perkoresponda kurso. La ĉefaj atingoj: regulaj kongresoj (53), de 1919 regule aperas la organo *Bulgara Esperantisto*. BEA okazigas internaciajn aranĝojn: UK-oj, IJK-oj, IFEF-kongresoj, IKEB, MEM-, KEK-konferencoj, Balkanaj Konferencoj, naciaj aranĝoj kun internacia partopreno: Internacia Somera E-Universitato, EKRA, Botev-tagaj k.a. Gajno de la Trofeo Fyne.

La ĉefaj problemoj: ekonomia malbonstato (perdo de proprietatoj), perdo de kluboj, malfacilas eldoni librojn kaj instruilojn, okazas malmultaj kursoj (maljuniĝo de la membraro).

## Germana Esperanto-Asocio

Retadreso: [gea@esperanto.de](mailto:gea@esperanto.de), hejmpaĝo: [www.esperanto.de](http://www.esperanto.de). La sidejo estas ĉe esperantisto. La biblioteko troviĝas en la urbo Aalen, kie estas 39.560 bibliografiaj unuoj, el kiuj triono estas elektronike registritaj. Ekzistas libroservo, estas eldonata la bulteno *Esperanto aktuel* - 6 fojojn jare kun po



Partoprenantoj de la 11-a Studsesio en Herzberg am Harz, okazinta ĉi-jare dum Pentekosto. GEA-prezidanto Andreas Emmerich (dekstre) transdonas al Peter Zilvar meritmedalon "Zamenhof" de GEA.

# Landaj Asocioj - la kolonoj de UEA

## Universala Esperanto-Asocio konsistas el Individuaj Membroj, kiuj rekte pagas sian kotizon, kaj kolektivaj membroj de Landaj kaj Fakaj Asocioj. En tiu ĉi rubriko ni prezentas al vi la Landajn Asociojn.



20 paĝoj. La membraro nombras 1266 plus ĉirkaŭ 5000 subtenajn membrojn en senkotizita kategorio. Estas 79 lokaj grupoj, la estraro estas 8-persona, la landa kongreso okazas ĉiun jaron dum longa semajnfino (ĝi daŭras kvar tagojn). Ekzistas perkoresponda kurso (rete kaj perpoŝte). La ĉefa atingo: la membrogazeto *Esperanto aktuel* denove estas tre varia gazeto kaj ĝi atingis sian ritmon; la kunlaboro inter GEA kaj GEJ (la junularo) bone funkcias; kelkaj bonaj aranĝoj estas jam tradiciaj (IS, PSI, GEK, IF...). La ĉefa problemoj: ĝenerale mankas homfortoj (kelkaj komisionoj vakas) kaj novaj membroj, kaj por tio mono por entute pli bone funkciigi kaj vigligi la asocion.

## Kostarika Esperanto-Asocio

Retadreso: [esperanto@racsa.co.cr](mailto:esperanto@racsa.co.cr), hejmpaĝo: [www.esperanto.co.cr](http://www.esperanto.co.cr). La sidejo estas ĉe esperantisto, ekzistas biblioteko kun proksimume 85 volumoj, libroservo, bulteno *Nuntempe*. Membroj: 32, lokaj grupoj ne ekzistas. Estraro 6-persona, landa kongreso: unufoje jare en marto, unu tago. Observanto ĉe la komitato de UEA: Jorge Antonio Leoni de León, [ldre@racsa.co.cr](mailto:ldre@racsa.co.cr). Ne ekzistas perkoresponda kurso, tamen oni rekomendas interretan kurson kun gvidado de membro de KREA. La ĉefa atingo: oficialaj kursoj de Esperanto en ĉefaj universitatoj en Kostariko. La ĉefa problemoj: manko de asocioj kaj de konstantaj financaj rimedoj.

## Kroata Esperanto-Ligo

Ĝi utiligas luitan sidejon, havas la hejmpaĝon: [pubwww.srce.hr/esperanto.kel](http://pubwww.srce.hr/esperanto.kel) kaj oficialan diskutliston: [ivan.pleadin@kc.chinet.hr](mailto:ivan.pleadin@kc.chinet.hr). Ekzistas kaj biblioteko kaj libroservo. Eldonata estas la bulteno *Tempo*, 4-foje jare, po 12-16 paĝoj. Ekzistas 17 lokaj grupoj kaj entute 250 membroj. La estraro estas 12-kapa.

La landa kongreso okazas ĉiun jaron kaj daŭras unu tagon. La ĉefa atingo estas la 86-a UK. La ĉefaj problemoj: nekontenta lingva nivelo de iuj membroj, perdo de la ejo. Estas problemoj pri la iama sidejo de la landa asocio kaj de iuj grupoj. KEL estas nun 'batalanta' por ilin reakiri.

## Kuba Esperanto-Asocio

La sidejo: senpage disponigata de la ŝtato. Hejmpaĝo: [www.gratisweb.com/diaznorberto/jajabokubo.htm](http://www.gratisweb.com/diaznorberto/jajabokubo.htm), retadreso: [kubesp@ip.etecsa.cu](mailto:kubesp@ip.etecsa.cu). Ekzistas biblioteko kaj libroservo, la bulteno nomiĝas *Avanco*, ĝi aperas 4 fojojn jare. Membroj estas 400, lokaj grupoj 9, la estraro estas 7-homa. La landa kongreso okazas ĉiun trian jaron kaj daŭras

4 tagojn. La komitatano estas Maritza Gutierrez Glez, la ĉefdelegito Jorge Toledo. Ekzistas koresponda kurso, la ĉefa atingo: malgraŭ plurjara kriza situacio en la lando kiu kaŭzis mankojn materiajn, financajn kaj aliajn, oni sukcesis teni vigla la movadon, kreskigi kaj nutri ĝin per nova sango, juna kaj entuziasma, oni materie subtenis la E-fakon de Radio Havano Kubo, kio kontribuis/as ankoraŭ nun al tio, ke la estraro de la radiostacio alte taksas la asocian subtenon. La ĉefa problemoj: stagno de la eldona fako, oni ne sukcesas eldoni lerno- kaj klerigmateriaĵojn.

## Latvia Esperanto-Asocio

Retadreso: [esperolat@e-apollo.lv](mailto:esperolat@e-apollo.lv), la hejmpaĝo [www.oic.lv/esperanto](http://www.oic.lv/esperanto). La sidejo estas ĉe esperantisto. Ekzistas biblioteko kun pli ol 500 libroj kaj dekoj da diversaj periodaĵoj.



Estas eldonata bulteno *Latvia Esperantisto*, ses fojojn jare, kun amplekso de 8 paĝoj. La estraro estas 7-kapa. Unu fojon jare, dum du tagoj, en decembro, okazas ĝenerala kunveno. Ne ekzistas perkoresponda kurso, sed ekzistas kurso por studentoj de Moskva ŝtata industria universitato, kies filio estas en Rigo. La studentoj lernas Esperanton kunlaboro kun Akademio de Sciencoj de San-Marino. En la biblioteko de la alternejo estas la asocia E-biblioteko. La ĉefa atingo: Baltiaj Esperanto-Tagoj, 1-semajnaj. La ĉefa problemoj: la angla lingvo estas pli populara, mankas rimedoj, ĉar membrokotoj ne estas altaj. Kelkaj aktivuloj mem pagas por eldono de informilo.

## Litova Esperanto-Asocio

EA havas 1036 membrojn kaj 16 lokajn grupojn. Retadreso: [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt), la sidejo estas propra, ekzistas biblioteko kaj libroservo. La bulteno, *Litova Stelo*, aperas 6 fojojn jare. La landa kongreso okazas ĉiun jaron kaj daŭras 2 tagojn.

La komitatano kaj la ĉefdelegito estas Povilas Jegorovas, la ĉefaj atingoj: eldonado, konstantaj E-kursoj, *Litova Stelo*,

BET-oj, bonaj kontaktoj kun ŝtataj instancoj. La ĉefaj problemoj: enkonduko de kursfinintoj al la E-movado, financaj malfacilaĵoj.

## Luksemburga Esperanto-Asocio

Ĝi ne havas propran sidejon, sed gastas ĉe esperantisto. La hejmpaĝo estas [www.start.at/lea](http://www.start.at/lea). La asocio ne havas bibliotekon nek libroservon, sed aperigas bultenon, *LEA-informilo*, 4 fojojn jare, kun amplekso inter 2 kaj 8 paĝoj laŭ la neceso.

La membroj estas ĉirkaŭ 100, el kiuj aktivas 36 kaj subtenas 65. Estas nur 1 grupo (memoru ke la lando estas tre malgranda) kaj la estraro estas 7-persona. Ne estas koresponda kurso. Kiel la ĉefan atingon oni en la enketilo skribis: *ni ekzistas!* La ĉefa problemoj: teni la intereson de la homoj.



## Malta Esperanto-Societo

Telefonnumero: 21892381. Retadreso: [maltaesp@global.net.mt](mailto:maltaesp@global.net.mt), hejmpaĝo: <http://maltaesp.hypermart.net>. Sidejo: luita biblioteko kun pli ol 300 volumoj kaj funkcianta libroservo. Bulteno: *Mezmara Stelo* aperas dufoje jare kun 24 paĝoj. Membroj ĉirkaŭ 50 el kiuj 4 IM de UEA. Ne ekzistas lokaj grupoj, ĉar la lando estas malgranda. La estraro estas 8-persona. Ne okazas landa kongreso, sed almenaŭ unu fojon jare tuttaga seminario por la komitatanoj por diskuti la venontjaran programon kaj la progreson de Esperanto en la malta insularo. La observanto ĉe la komitato de UEA estas John Vella-Bondin ([johnvb@global.net.mt](mailto:johnvb@global.net.mt)). Funkciaj korespondaj kursoj (elementa kaj mezgrada) laŭ la zagreba metodo. La ĉefaj atingoj: eldonita poŝtmarko fare de la malta poŝto okaze de la jubileo de Esperanto (1987), inaŭguro de monumento al L. L. Zamenhof far la prezidento de Malto (1990), organizado de internacia turisma semajno en Malto ĉiun duan jaron (raporto kun fotoj pri la 8-a turisma semajno, sur la hejmpaĝo de la societo), fondo de junulara sekcio en 2001, estrata de Bruno Horne, James Vella-Bondin kaj Silvan Mugliett. La ĉefa problemoj: ĉiuj en malto parolas la anglan, kaj kredas ke ĝi sufiĉas por internacia komunikado.



(Kompilis Michela Lipari, daŭrigota)



Partoprenantoj de la 8-a Internacia Turisma Semajno en Malto, okazinta septembro 2001, ĉe la malta Zamenhof-monumento. (La 9-a ITS okazos de la 6-a ĝis la 13-a de septembro 2003.)

**Dime BOJANOVSKI-Dize** (1909-2002), grava makedona politikisto kaj kunfondinto de Makedonia E-Ligo, forpasis la 11-an de februaro en Skopje.

**Hermínia K. de FERNÁNDEZ** (1915-2002), 20 jarojn fakdelegito pri edukado kaj turismo, mortis en Córdoba, Hispanio.

**Jerahmiel GILADI** (1908 -2002) forpasis en Israelo en la aĝo de 94 jaroj. Dum 70 jaroj aktiva membro kaj Komitatano de Palestina Esperanto-Ligo kaj Esperanto-Ligo en Israelo.

**John GRUND** (1924-2001), iama delegito de UEA, mortis septembre en Usono.

**Hil HAMERS-Houtman** (1924-2001), konata nederlanda esperantistino kaj naturamikino, mortis la 3-an de novembro.

**Luiz HERNÁNDEZ Yzal** (1917-2002), fondinto kaj direktoro de la E-Muzeo de Sant Pau d'Ordal en Barcelono, Hispanio, honora membro, multjara delegito kaj ĉefdelegito, forpasis la 24-an de februaro 2002.



**D-ro Josef KONDOR** (1921-2002) mortis la 5-an de marto 2002. Gimnazia instruisto, helpanto de lepruloj, delegito en Koblenz (Neuwied).

**Hilda KORÍNKOVÁ**, vidvino post la estara E-poeto Jiří Kořínek, mortis la 23-an de marto 2002 en Ĉeĥio.

**Werner LAEDERACH-Emmes** (17.1.1912 - 1.3.2002). Li prezidis la lokan kongresan komitaton de la 64-a universala kongreso de esperanto 1979 en Lucerno kaj estis dum multaj jaroj estrarano de SES, gvidis nombrajn kursojn kaj dum longa tempo estis motoro de la svisa movado.

**Adrian OATES** mortis la 8-an de marto 2000. Iama ĉefo de la Chester Esperanto-Asocio, longdaŭra membro de la Nord-okcidenta Esperanto-Federacio, EAB, delegito ĉe UEA, kaj Radio-amatoro G4M OU.

**Angela-Lela ROTKVIC** mortis la 7-an de marto 2002 en Zagrebo. Membro de E-Societo Bude Borjan, ŝi aktivis en fako ĝardena



kulturo, kaj publikigis artikolojn pri tiu temo. Edzino de la konata akademiano Ivo Rotkvic, kiun ŝi akompanis en lia riĉa Esperanta kariero.

**Lennart SVENSSON** (1930-2002), magistro pri filozofio, delegito kaj dumviva membro en Ljungby, Svedio, mortis ĉi-jare en aprilo.

**Alfonso Tur THOMAS** (1918-2002), delegito en Barcelono, vicprezidanto de Hispana Esperanto-Instituto, redaktoro de la revuo *Europa Unio* kaj E-instruisto, forpasis la 2-an de januaro post longa malsano.

**Henk UITTENBOGAARD** (1920-2002), estrarano de la sekcio en Hilversum, Nederlando, mortis la 24-an de februaro en Utrecht.

**Korekto:** en la marta revuo dum kompostado moviĝis foto de Hermina KIRKERUP en la tekston de Gigi HARABAGIU (ne Gigi, kvankam tiel estas prononcata ŝia nomo). Ni aperigas ŝian foton kaj pardonpetas.



## Krucenigma konkurso:

la kaŝitan proverbon bv. sendi ĝis tri monatoj post la apero (poŝte, fakse aŭ rete) al la redakcio.

### DEKSTREN AL LA CENTRO:

- 1 – Papiroso (sciencia mallongigo).
- 2 – Ceremonie, solene (pri marŝo).
- 3 – Perforta forprenado.
- 4 – Libertagaj, libertempaj.
- 5 – Ceremonie donos nomon.
- 6 – Malsatas pro religia motivo.
- 7 – Kun bruo eligis trabuŝe aeron.
- 8 – Rilataj al zorgo por eviti danĝeron.
- 9 – Pecoj de malmola papero.
- 10 – Kovras per kudritaj ŝtofoj.
- 11 – Konserviĝ', enmetiĝ' en salon.
- 12 – Piedmoviĝis reen.
- 13 – Rilata al regiono en Aŭstrio.
- 14 – Soldatece, en maniero de junpionira movado.
- 15 – Ido de sovaĝa porko.
- 16 – Senakviĝo.

### MALDEKSTREN AL LA CENTRO:

- 1 – Formiĝ' de reproduktaj organoj ĉe kriptogamoj.
- 2 – Eliĝis en formo de brilantaj globetoj.
- 3 – Envolvita en protektan tegaĵon.
- 4 – UNUA PARTO DE LA KAŜITA PROVERBO.
- 5 – Estiĝo, produktiĝo.
- 6 – Aro da suĉinfanoj.
- 7 – Mezurunuo de elektra kapacitanco.
- 8 – TRIA PARTO DE LA KAŜITA PROVERBO.
- 9 – Vimomo.
- 10 – Tropikaj plantoj kun pikiloj.
- 11 – Gardas infanon.
- 12 – KVARA PARTO DE LA KAŜITA



PROVERBO. 13 – Ne foriras, daŭre estas.  
14 – Aroj da personoj aliĝintaj al apartaj doktrinoj.  
15 – Karakterizmanieraj.  
16 – DUA PARTO DE LA KAŜITA PROVERBO.

**HELPO:**  
Sporiĝ', Gustao, pekliĝ', Stiria.

### Solvo el la marta revuo:

"Kvindekjara jubileo de la kastelo Greziljono".

La solvojn sendis (malgraŭ tio, ke mise ne estis indikite ke oni faru tion!): Germain Pirlot (Belgio), Mila kaj Gerard v.d. Horst-Kolińska (Nederlando), J. Poptie kaj J. Bankowska (Nederlando), Franz-Peter Kurtz (Germanio), André Léval (Francio), Jean-Marie Ries (Luksemburgo), Juliano Ducrocq (Francio), Dieter Dungert (Germanio), Neal McKown (Usono), Bert Schumann (Germanio), Pieter Jan Doomen (Belgio), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Erkki Kempainen (Finnlando), Denise Hubert (Francio), František Štoviček (Ĉeĥio) kaj José Mauro Progiante (Brazilo).

La libropremion gajnis: Denise Hubert. Elkoran gratulon!



## PERSPEKTIVO

Ŝtutgrupo pri internacia lingvo

Universala Esperanto-Asocio  
en la periodo 1970 - 1980

Tekstoj de la konkurso de la  
PREMIO MIYOSHI  
2001



Universala Esperanto-Asocio  
2002

LA LIBRO KIUN ĈIU UEA-AKTIVULO DEVUS POSEDI

## Universala Esperanto-Asocio en la periodo 1970-1980

Por la nova generacio:  
por ke ĝi konu kelkajn nekredblajn de tiu periodo

Por la malnova generacio:  
por ke ĝi amuze memoru tiujn nekredblajn

Partoprenado en la konkurso  
por la Premio Miyoshi 2001 de  
D. Cibulevskij, N. Aleksiev, W.M.A. De Smet  
kaj G. Maertens, kun du tekstoj de D. Quirke

80 A4-paĝoj; 9 eŭroj

Eldonis Sonorilo, 2002; presis kaj distribuas FEL

Aĉetbla jam ĉe UEA kaj ĉe FEL

## "Pasporto" al 83 landoj

La plej populara eldonaĵo de TEJO, la listo de esperantistaj gastigantoj *Pasporta Servo*, aperas ekde 1974. Ĉi-jare ĝi enhavas 1231 gastigantojn el 83 landoj, sur 207 paĝoj.

La gastigantoj ricevas ĝin senpage. La aliaj povas ĝin mendi je 15 EUR (kun triona rabato ekde tri ekz.).



Por aliĝi kiel gastiganto, petu aliĝilon de UEA aŭ de la landaj organizantoj. La aliĝa limdato estas la 1-a de novembro. La gastigantoj ricevos memorigilon en aŭgusto.

Pliaj informoj ĉe la kompilinto:  
Derk Ederveen,  
Westernburgstraat  
15, NL-2275 XR  
Voorburg,  
Nederlando.



**Planned Languages: From Concept to Reality.**  
De Smet, Schubert, Tonkin, Blanke, Duc Goninaz, Koutny, Liu Haitao, Corsetti, La Torre, van Oostendorp. Red. Klaus Schubert. Brussel: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst, 2001. 257p. ISBN 80681318. 24 cm. Diverslingva: angla, Esperanto, franca, germana, nederlanda. Ok studoj pri la demando kiel planlingvo evoluas al efektiva lingvo. Libra eldono de la n-ro 2000/3-4 de *Interface, Journal of Applied Linguistics*. €24,00. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.



## VOJAĜO EN ESPERANTO-LANDO

### APERIS EN NOVA VESTO

*Abunde ilustrita, kun dukolora preso tra la tuta libro, perfektiga kurso de Esperanto kaj gvidlibro pri la Esperanta kulturo.*

*Vojaĝo en Esperanto-lando.* Boris Kolker (1939).

Rotterdam: UEA, 2002. Dua, reviziita kaj korektita eldono. 279p. 21cm. ISBN 92 9017 078 6. Prezo: € 18,00. Triona rabato ekde 3 ekz.



## Mazi estas denove aĉetebla!



La plej sukcesa vidbenda kurso, esperantigita laŭ sukcesa metodo de la prestiĝa BBC, estas denove en la merkato, ĉi-foje kontraŭ duona prezo de EUR 39,00 (antaŭe NLG 180 = EUR 81,68).

### MAZI EN GONDOLANDO

Verkita de Wendi Harris. Esperantigis Roman Dobrzyński, Miła van der Horst-Kolińska, Stefan MacGill kaj Andrzej Pettyn. Den Haag: Internacia Esperanto-Instituto, 1995. Intergeneracia kurso de Esperanto por infanoj, gejunuloj kaj plenkreskuloj. La kompleto konsistas el 2 vidbendaj (180 minutoj entute) en PAL-sistemo, tekstolibro (159p) kaj sankosedo (ekzercoj).

Krome, ekster tiu kompleto mendeblas aparte ankaŭ:

#### Ekzerco kaj ludu

Aktiviga libro de Barbara Chmielewska, 94+5p. 24cm. Plenkolora presita sur kartoneca papero; ringe bindita. Prezo: EUR 7,80. Ankaŭ la baza tekstolibro de la kurso estas aparte mendebla — prezo: EUR 7,50.

La Libroservo de UEA estas la ĉefa distribuanto de la tuta Mazi-materialo. Ni donas trionan rabaton por samtempa mendo de minimume 3 ekz. de la sama ero. Kiel kutime, aldoniĝas 6% da imposto (nur por la loĝantoj de EU) kaj 10% por sendokostoj.